

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Ilona Koutny, la  
Esperantisto de la Jaro  
Niaj atingoj kaj fiaskoj  
en la jaro 2008

Katalunoj digne festis  
la Jaron de la Lingvoj  
Kion Zamenhof skribis  
pri la naci(onal)ismo?

Poemoj de Vjazemskij  
El “Mia jarcento” de  
Günter Grass

Nia trezoro: La unua  
esperantista gazeto

Tri ampleksaj recenzoj

Novaĵoj pri nia muziko



2009

1

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2009. №1 (171)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2009**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 450 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 27a paĝo.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 650 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (2000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1200 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (700 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (400 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio, aŭ de la aŭtoro, kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2009, №1 (171).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 15 декабря 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Redakcie

Sojle de ĉiu nova jaro oni kutime rememoras jenan ŝercon:

— Diru, kia estos la nova jaro, ĉu bona aŭ malbona?

— Hmm, nu... eble meza...

— Tio estas?..

— Pli malbona ol la antaŭa, sed ja pli bona ol la post-sekva.

Se akcepti, ke pri la stato de la gazetoj oni ĝenerale juĝas laŭ la kvanto da abonantoj, la supra ŝerco ŝajnas maltrafa, kaj ni povus fieri, ke la jaro 2008a estis bona: nia abonantaro kreskis de 539 (en 2007) ĝis ĉ. 570. Rekorda nombro, neniam atingita pli frue. *La Ondo* aperis akurate kaj havis ĉiumonate kvar pliajn paĝojn, do entute 44 ekstrajn paĝojn, danke al donaco de ruslanda mecenato.

Tamen ĉi tiuj agrablaj nombroj estis atingitaj sur la fono de multaj malgraŭoj. La financo de *La Ondo* stagnas, ĉar la aldonaj abonkotizoj donis malpli da enspezoj ol ni devis krompagi en la cirkonstancoj de la galopanta prezosaltado. Ĉiam pli komplika iĝas la trafiko inter Kaliningrado, kie nia gazeto estas redaktata, kaj Olsztyn, kie ĝi estas presata — en 2007 inter la du ĝemelurboj okazis 14 regulaj busvojaĝoj ĉiusemajne (po du ĉiutage), sed en 2008 ni havis nur 2 buŝvojaĝojn ĉiusemajne (po unu marde kaj vendrede). Foje eĉ tiujn maloftajn vojaĝojn oni nuligas, ĉar pro la novaj severaj vizoreguloj tute mankas dezirantoj veturi (la rekta buso inter Kaliningrado kaj Kaŭno, kie estas presataj niaj libroj, estas definitive nuligita pro la manko de pasaĝeroj). Ankaŭ la sanproblemoj...

Do, la jaro 2008a iusence (sed alisence ol diris la supra ŝerco) estis *meza* — pli bona rezulto ol en la 2007a, sed pli malbonaj kondiĉoj ol en la 2007a.

Ĉu bona, aŭ malbona, aŭ *meza* estos la jaro 2009a, ni ne scias. Sed ni certe scias, ke ĝi estos *jubilea*. Duoble jubilea. Okaze de la 150a naskiĝjaro de Ludoviko Zamenhof ni klopodos regule, kvankam eble ne ĉiunumere, aperigi materialon de/pri la Iniciatoro. Ĉi-kajere vi legos en lia faksimila letero, kion li pensis pri naci(onal)ismo. Krome, ekster la jubilea rubriko aperas recenzo de la libro pri lia filino Lidia kaj prezento de *[La] Esperantisto*, kiun li redaktis.

Ĉi tiu prezento aperas en la rubriko *Nia Trezoro*, kiu ĉi-jare estas dediĉita al la Esperanto-gazetaro. Kaj en la gazeta sfero estas la dua jubileo — la unua numero de *La Ondo de Esperanto* aperis antaŭ 100 jaroj. Pri la naskiĝo de *La Ondo* vi legos en la februara kajero.

En la februara kajero vi retrovos kelkajn tradiciaĵojn: intervjuon kun la Esperantisto de la Jaro (gratulojn al Ilona Koutny!), la rezultojn de *Liro* kaj de la Internacia Fotokonkurso, la statistikon pri la libroeldonado en Esperantujo...

Kompreneble, vi legos tion, se vi reabonos. Ĉe la reabono ne forgesu pri tiuj, kiuj ŝatus legi la revuon sed ne povas pagi ĝin, precipe post la neevitebla altiĝo de la tarifo — kune kun la kotizo faru donacon al nia *Abonhelpa Fonduso*, danke al kiu pli ol dudek personoj en 2008 legis *La Ondon*.

**Bonan novan jaron 2009!**

**Gajan Kristnaskon!**

HaGo

AlKo

**Sur la kovrilpaĝo** estas d-rino Ilona Koutny, la Esperantisto de la Jaro 2008.

# Jaro 2008: Niaj atingoj kaj fiaskoj

**La Ondo okazigis temajn “Rondajn Tablojn” pri la Esperanto-gazetaro, pri libroeldonado, pri la centjariĝo de UEA, kaj pri (ne)legado de Esperanto-libroj. Nun, same kiel antaŭ unu jaro, ni petis diverstendencajn aktivajn esperantistojn respondi al la demando: “Kiujn Esperanto-eventojn en 2008 vi taksas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j). El la dek kvar demanditoj, ok sendis respondojn.**



**Spomenka Štimec**  
**Kroatio**  
**Verkistino, sekretario de Kroata Esperanto-Ligo**

La plej grava evento en 2008 estas la fakto, ke Eŭropa Komisiono aprobis du projektojn en kiuj Esperanto peras: projektoj de Eŭropa Esperanto-Unio kaj de Kroata Esperanto-Ligo (KEL).

Landnivele la plej pozitiva programo estas la fakto, ke por sia jubilea festo KEL sukcesis venigi ĉ. 1500 personojn kaj aŭskultigi al ili muzikon kaj elektitajn erojn el la historio de Esperanto en Kroatio.

Je la nivelo de libroj pleje imponas la *Konciza Enciklopedio pri Originala Esperanta Literaturo* de Geoffrey Sutton.

Je la nivelo de faka agado aparte impresis la Ĵurnalista Konferenco en Vilnius.

La plej negativa estas la fakto, ke Litovio inter Landaj Asocioj de UEA ne havas adekvatan partneron por similnivele daŭrigi la laboron.

## **Ilona Koutny — la Esperantisto de la Jaro 2008**

La Ondo de Esperanto iniciatis en 1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al la projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007).

### **La rezulto de ĉi-jara voĉdonado:**

Ilona Koutny . . . . . 12 voĉoj  
Peter Baláž . . . . . 4 voĉoj  
Katalin Kováts, Geoffrey Sutton . . . . . po 3 voĉoj  
Normand Fleury, Yves Nevelsteen . . . . . po 2 voĉoj  
Tri kandidatoj ricevis po unu voĉon.

D-rino **Ilona Koutny**, hungarino loĝanta en Pollando, estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2008 pro la kompetenta kaj sukcesa gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań. Ĉi-jare ŝi aparte meritis rekonon pro la dek-jariĝo de la Studoj, pro la ekzamensesio de la tria grupo, pro la unua instrurajta ekzameno kune kun ILEI, pro la komenco de la kvara grupo, kaj speciale pro la simpozio “Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko”, kiun ŝi pretigis kaj efektivigis ĉi-septembre ĉe UAM.

**Halina Gorecka**, sekretario

**Probal Dasgupta**  
**Barato**  
**Prezidanto de UEA**

Laŭ mi la plej pozitiva Esperanto-evento estis la poresperanta rezolucio de la pola parlamento.

La plej negativa estis la serio da mortoj komence de la jaro.

Mi bedaŭras, ke tuj post dusemajna, tre fruktodona sed ankaŭ tre tempode-diĉiga vojaĝo tra Ĉinio mi ne povas formuli ĉi tion pli suke.



**Li Jianhua**  
**Ĉinio**  
**Konstanta Konsilanto de la Pekina Esperanto-Asocio**

Mi opinias, ke la plej pozitiva Esperanto-evento en la jaro 2008 estas la Unua Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj okazinta la 26–30-an de majo en Vilno — la ĉefurbo de Litovio. Al la kongreso aliĝis 188 esperantistoj el 37 landoj. Ĉiuj aliĝintoj estis akceptitaj al la kongreso. Kiel la unusola reprezentanto de ĉina ĉeftero, mi ĉeestis tiun kongreson.

Tiu vojaĝo kreis multajn “unuafojajn” en mia vivo: Unuafoja vojaĝo eksterlanden, unuafoja vojaĝo per aviadilo kaj en la angla lingvo, unuafoja internacia kongreso per kaj por Esperanto, unuafoja prelego en tia kongreso, unuafoja vizito al Litovio kaj Eŭropo, unuafoja interparolo kun alilandaj altranguloj (dum la kongreso okazis akceptoj de la prezidanto de la parlamento, la ĉefministro kaj la vilna urbestro) kaj unuafoje intervjuita de televido eksterlande (Povilas, aŭstralia esperantisto Badu kaj mi estis intervjuitaj de iu televida stacio), ktp.

Por okazigi tiun kongreson, la litova registaro kaj la loka komitato de la kongreso faris grandan klopodon. Mi dankas la LKK-anojn pro ilia klopodo! Mi opinias ke la kongreso estas sukcesega, do mi gratulas ilin!

Negativa evento... En la kuranta jaro okazis en Pekino la 29aj Olimpikoj kaj la 13aj Handikapulaj Olimpikoj. Kun la celo fari kontribuon al la du grandaj sportkunvenoj kaj al la esperantistoj, venintaj ĝui surkampe sportajn konkursojn kaj ekskursi en la urbo, la Pekina Esperanto-Asocio fondis la “Familion de Esperantistoj en Pekino” por gastigi alilandajn esperantistojn.

Sed dum la Olimpikoj nur tri esperantistoj vizitis Pekinon, kaj la familio funkciis nur dufoje por gastigi samideanojn el Brazilo, Hispanio kaj Germanio. Mi ege bedaŭras, ke al ĝi mankis gastoj el nia Esperantujo.





**Vjačeslav Ivanov**  
**Ruslando**  
**Redaktanto de**  
***Esperanto-Novosti-Info***

Mi taksas tre pozitivaj laŭ ĝia nivelo kaj organizmaniero la eventon de TEĴA fine de majo en Vilno. Kvankam iajn palpeblajn rezultojn post tio mi ne vidis, mi tamen bedaŭras, ke pro burokrataĵoj mi ne povis veni al Vilno, des pli ke mi estis tien invitita. Cetere evoluon de TEĴA eblas sekvi ĉe [www.tejha.org](http://www.tejha.org), ankoraŭ ne vaste konata adreso.

Miksitan senton postlasis mia unua Universala Kongreso ĉi-jare. Mi eble atendis ion pli grandan kaj envolvigan. Tamen tie mi konatiĝis kun kelkaj elstaraj esperantistoj, pri kiuj antaŭe mi nur legis en *LOdE* — tio certe restos neforgesebla sperto por multaj jaroj.

Tre negativaj eventoj de la jaro por mi estis tiuj, kiuj ne okazis: anstataŭ ĉiujaraj Rusiaj Esperanto-Tagoj okazis komuna ukraina-ruslanda evento en Krimeo, jam de kelkaj jaroj ne okazas junulara somera tendaro OkSEJT, Universala Kongreso laŭ la ĉi-jara decido ne okazos en Moskvo ĝis mia maljuniĝo. Tio kune impresas min kiel falo, almenaŭ en la regiono.



**Giorgio Silfer**  
**Eŭropo**  
**Verkisto, instruisto kaj organiza konsilisto**

Kongresoj: pozitive, la ĵurnalista en Vilno; negative, la universala en Roterdamo (laŭ multaj atestoj de partoprenintoj).

Literaturaj eventoj: pozitive, la apero de la duobla KD kun *La infana raso* en deklamo de William Auld; negative, la subita morto de Claude Piron/Johàn Valano.

Eksteraj rilatoj: pozitive, la ĉeesto de nia literaturo en gravaj kongresoj/iniciatoj (PEN, WALTIC, ktp) kaj de nia lingvo en la konferencoj/laborgrupoj de ALTE (Asocio de LingvoTestistoj en Eŭropo); negative, la manko de dialogo inter tiuj kiuj havas samajn interesojn en eksteraj rilatoj (malgraŭ la disponeblo de la Esperanta Civito al SAT kaj al UEA).

Organize: pozitive, la progreso de la Esperanta Civito, kiu speguliĝas ankaŭ en la interna harmonio, malgraŭ la ĉeesto de ideologia diverseco, kaj la aktiveco de E@I; negative, la regreso kaj de SAT kaj de UEA, kiun reflektas ankaŭ la interna malharmonio (eksiĝoj kaj kvereloj en SAT; konfliktoj en ILEI kaj UEA), malgraŭ la manko de ideologia diverseco.



**Radio Esperanto**

*Halina kaj Aleksander  
 parolas el Kaliningrado*

Podkasta servo de *La Ondo*

Aŭskultu: <http://la-ondo.rpod.ru>



**Renato Corsetti**  
**Italio**  
**Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio**

La fakto, ke mi ne povas tuj pensi pri tre pozitivaj aŭ tre malpozitivaj eventoj, jam montras ion pri la okazintaĵoj en 2008.

Laŭ mi pozitivaj estas:

- la kunveno pri lingvaj rajtoj en Ĝenevo en aprilo okaze de la 100-jariĝo de UEA;
  - la celebrado de la Zamenhof-tago en Unesko en Parizo;
  - la vicleco de la azia movado;
  - la unua mezorienta kunveno en Amano, kiel komenco de serio de tiaj kunvenoj;
  - la vicleco de Esperanto-rilataj aferoj en la reta mondo.
- Malpozitivaj estas:
- la sinteno de la funkciuloj de EU al Esperanto kaj ilia novkoloniisma emo al la angla;
  - la morto de Claude Piron.



**Jakvo Schram**  
**Belgio**  
**Prezidanto de la Plenumkomitato de SAT**

Plej pozitiva mi konsideras la eblojn relative facile havi informojn pri Esperanto en la reto. Rilatas pri kursoj, retaj eldonoj kaj ĉiu ĝenerala informo. Mi opinias ke la paŝo al interreta komunikado estas plene farita nun.

Bedaŭrinde tiu eblo ankaŭ havas negativan flankon. La ne kontrolata libervola informado kaŭzas, ke homoj ricevas falsajn informojn. Aperas en la reto atakoj al personoj, sen ke la koncernato mem estas informata aŭ sen ke oni petas lian/ŝian opinion pri la afero. Tio pensigas min pri gazetaro de plej malalta nivelo, kiu malpurigas la medion. Alia negativa flanko de la interreta komunikado estas, ke la lokaj kluboj suferas malkreskon, malaltiĝon de enspezo, bezonata por funkcii. Ni ne povas iri al ideo, ke estonte Esperanto estu tute virtuala afero.

Evidente, pro fakto, ke mia vivo de esperantisto precipe situas en la medio de SAT, mi ne vere sekvas la evoluon ene de Esperantio, sed estas uzanto de la lingvo favore al celoj kiuj rilatas SAT.

Dum la kongresoj, kiujn mi ĉi-jare partoprenis, mi ja povis konstati, ke pluraj junuloj aktivis en UEA kaj SAT. Eble la plej grava afero estas, ke nova sango, junaj agantoj pretas daŭrigi la laboron de la antaŭuloj. Ĉu Esperantio povas deziri pli?

La kongreso de ĵurnalistoj nepre estas menciinda. Estas mia espero, ke el tiu flanko venas deziro krei etikan normon, kiu plibonigos la informadon ene de Esperantio kaj al mondo ekster Esperanto.

**Madeleine de Zilah**  
**Francio**  
**Kunredaktanto de *La Gazeto***

La plej pozitiva Esperanto-evento en 2008: eldonado de la *Konciza enciklopedio pri la originala literaturo en Esperanto* de Geoffrey Sutton;

La plej negativa Esperanto-evento en 2008: la fakto ke tiu ĉi enciklopedio estas en la angla, ne en la esperanta.

## Interveno de EEU

11 nov 2008 Jozef Reinvarit kaj Seán Ó Riain ĉeestis en Bruselo tuttagan kunvenon pri lingva kaj kultura diverseco en Eŭropo, kiun organizis *Assodilit* — asocio por diskonigi la italan lingvon.

Ó Riain prezentis la Esperanto-projekton *Springboard*, kaj Reinvarit informis multajn homojn pri la agado de la Eŭropa Esperanto-Unio. En la kunveno parolis ankaŭ Leonard Orban, komisionano de EU pri plurlingveco, kaj Ĝenerala Direktoro K.J. Loennroth, ĉefo de la tradukservo de la Eŭropa Komisiono. Michael Cwik parolis ankaŭ iom pri niaj ideoj sen menciigi la vorton “Esperanto”.

Laŭ *Eŭropa Bulteno*

## Poŝtmarko pri la centjara UEA

Okaze de la 93a UK en Roterdamo UEA mendis ĉe la poŝta kompanio TNT poŝtmarkon kun la kongresa simbolo. Ĝi fariĝis grandega sukceso kaj praktike elĉerpiĝis jam dum la UK. Malgraŭ multaj petoj ĝi ne estis reeldonita, ĉar post la UK ĝia temo ne plu estis aktuala. Nun ĝi estas ŝatata objekto ankaŭ ĉe ne-esperantistaj kolektantoj, kiuj en retaj aŭkcioj pagas por ĝi multe pli altan prezon ol la originala vendoprezo.

La furoro de la kongresa poŝtmarko tamen instigis UEA mendi novan markon pri temo, kiu ja ankoraŭ aktualas: la jubilea jaro de UEA. La nova marko aperis en novembro kaj ĝia nominala valoro egalas al tiu de la enlanda afranko por ordinara letero en Nederlando. Ĝi montras la jubilean simbolon de la 100-jara UEA, desegnitajn de Guillem Sevilla, kun la teksto “100 jaroj Universala Esperanto-Asocio”.

La jubilea poŝtmarko estas vendata en folioj de 10 markoj; ĝi estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA. Unu folio kostas 5,50 eŭrojn plus afranko. Ankaŭ tiu ĉi marko estis eldonita en tre limigita kvanto.

GK UEA



## Kongresa temo kun du dimensioj

En 2009 oni festos la 150an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof. Tre konvene UN proklamis la saman jaron Internacia Jaro de Interpaciĝo. Estis do nature, ke la Estraro de UEA inspiriĝis de tiu koincido, kiam ĝi elektis “*Krei pacan ponton inter la popoloj*”: *Zamenhof hodiaŭ* kiel la temon de la 94a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta 25 jul – 1 aŭg en Bjalistoko. La citaĵo en la vortumo de la temo devenas de la parolado de Zamenhof en la Kembriga UK en 1907.

La kongresa temo estos vaste traktata en la oficiala programo de la UK, sed la Estraro esperas, ke ankaŭ fakaj asocioj konsideros ĝin en siaj propraj dumkongresaj kunsidoj. Krome, por la Internacia Kongresa Universitato oni bonvenigas prelegproponojn pri la kongresa temo. Ankaŭ la Belartaj Konkursoj aparte alvokas konkursaĵojn pri la temo. Fine, la temo evidente ne estas io specife rezervita por la UK. La Estraro instigas trakti ĝin en konvenaj manieroj kaj formoj en ĉiaj Esperantoaranĝoj kaj en la Esperanto-gazetaro ankaŭ dum la cetero de la jaro.

GK UEA

## Prelegi en Bjalistoko

Dum la 94a UK en Bjalistoko okazos la 62a sesio de Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel (PK 767, IL-71799 Makabim, Israelo; ✉ amri@huji.ac.il) antaŭ 31 jan 2009.

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Proponantoj de IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Estos aparte bonvenaj proponoj ligitaj al la temo de la 94a UK (“*Krei pacan ponton inter la popoloj*”: *Zamenhof hodiaŭ*). Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto (kune ne pli ol unu paĝo).

La proponoj estos prijuĝataj de la Komisiono pri IKU kaj fine konsiderataj de la Estraro de UEA.

GK UEA

## 110 vizitis la Malferman Tagon

La 29a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en sabato, la 29a de novembro, allogis 110 vizitantojn el 14 landoj. En la agadkalendaro de UEA ĝi estis la lasta aranĝo dediĉita al la 100-jariĝo de la Asocio.

La programo estis tre abunda. La ĉefa preleganto estis la ĉi-jara Grabowski-premiito Andreas Künzli, kiu faris du prelegojn. En la unua li parolis pri la vivo de Hector Hodler, la fondinto de UEA, kaj ankaŭ pri li kiel modelo por verkoj de sia patro, la pentristo Ferdinand Hodler. En sia dua prelego Künzli ekskursigis la aŭskultantojn tra Ĝenevo, kun salto al Berno, konigante la lokojn, kie troviĝis la Centra Oficejo dum la svisa periodo de UEA.

Ĉi-jare ankaŭ Instituto Hodler ‘68 festis rondan datrevenon. Pri la celoj kaj historio de la 40-jara financa subtenanto de UEA parolis Grégoire Maertens, ĝia preskaŭ dekomenca estrarano kaj longtempa prezidanto.

La prelegoj de Künzli kaj Maertens okazis en la konferencjo de la CO, kiu ĉi-foje estis ankaŭ koncertejo, kie dufoje kantis kaj gitarludis Alejandro Cosavella el Argentino.



Paralela programo okazis en la biblioteko. Andreas Künzli prezentis sian imponan verkon *Universalaj lingvoj en Svislando*, Ziko van Dijk lanĉis la gvidlibron *Vikipedio por vi*, kaj Marek Blahuš parolis pri *Esperanta kulturo: Ĉu konservinda elektronike?*. Aparte atendita estis la lanĉo de *Esperanto estas...*, DVD, kiu en moderna, alloga maniero prezentas Esperanton por la ekstera mondo. La nova filmo naskiĝis el multnacia kunlaboro kadre de Esperanto(@)Interreto, kies aktivuloj prezentis sian agadon dum aparta programero.

La Libroservo de UEA vendis dum la tago librojn k.a. varojn por 2701 eŭroj. Pleje furoris *Vikipedio por vi*, de kiu vendiĝis 12 ekzempleroj.

GK UEA

## Katalunoj digne festis la Internacian Jaron de Lingvoj

La kataluna esperantistaro koncentrigis sian festadon de la Internacia Jaro de Lingvoj en la dek tagoj inter la 29a de novembro kaj la 8a de decembro.

La plej multenombra aranĝo estis la 34a Kataluna Kongreso de Esperanto, kiu kunigis 6–8 dec en Sabadell ĉ. 170 partoprenantojn el 15 landoj de tri kontinentoj.

Elstaris la ĉeesto de prof. Humphrey Tonkin kaj d-ro A Giridhar Rao, kiuj kontribuis al la kongresa temo “Esperanto kaj tutmondiĝo: perspektivoj por la estonto”. La kvin prelegojn pri la kongresa temo kompletigis tri prezentoj pri la situacio en tri malsamaj mondopartoj — Kaŭkazio (Pedro Hernández), Afganio (Joan Felip) kaj Barato (A Giridhar) —, kaj entute ĉ. 40 programeroj. Elstaris ankaŭ la arta programo, kun du teatraĵoj de Rikardo Cash luditaj de la Teatra Trupo de Tuluzo, koncertoj de Alejandro Cossavella kaj Martin Wiese, popol-dancoj gviditaj de Mon Cardona, kaj la tradicia literatura mateno en la kongresa ferमतago, ĉi-okaze kun prelegoj de Abel Montagut kaj Humphrey Tonkin.

La kongreso omaĝis ankaŭ la figuron de Jaume Viladoms (1913–1976), unuaranga pedagogo kaj aktiva esperantisto, kiun la urbo Sabadell omaĝis laŭlonge de la tuta jaro kun la aktiva kaj videbla helpo de la lokaj esperantistoj. Fine de la kongreso okazis kortuŝa omaĝo ankaŭ al Llibert Puig — lernanto de Viladoms en la unua postmilita kurso de Esperanto en 1950, kaj motoro de la kataluna Esperanto-movado dum pli ol 50 jaroj — kaj al Hèctor Alòs, sekretario de KEA kaj redaktoro de *Kataluna Esperantisto* en la lastaj jaroj, kiu transloĝiĝas al Ĉuvaŝio.

### Komuna lobiado de KEA kaj UEA

En la antaŭa semajnfino la kongreson antaŭeniris serio de tri rondaj tabloj, grupigitaj sub la nomo Ciklo de kolokvoj *Lingvoj, diverseco kaj paco*, en kiuj partoprenis 12 renomaj fakuloj. 29 nov matene sub la gvido de la nord-kataluna socilingvisto Gentil Puig-Moreno, diskutis pri “kelkaj ekzemploj de la monda lingva diverseco: katalunaj proponoj” Antoni Mir, direktoro de Linguamón, Joaquim Torres, prezidanto de la Asocio de Katalunlingvaj Sociolingvistoj, kaj Emili Boix, katedrestro pri socilingvistiko en la Universitato de Barcelono. Vespere, la socilingvisto Jordi Solé i Camardons gvidis interparolon inter la



Sabadell (Foto de Josep M. Serrano)

lingvistino Carme Junyent, membro de la Esplor-Grupo pri Minacataj Lingvoj de la Universitato de Barcelono, Montserrat Casacuberta, kunordiganto de la Volontularo por la Lingvo de la Centro por Lingva Normaligado de Girona, kaj la argentin-devena ĵurnalistino Patrícia Gabancho pri “la lingva diverseco en Katalunio: defioj kaj ŝancoj”. Fine, matene 30 nov, la politologo Jordi Armadans, direktoro de la Fondaĵo por la Paco, gvidis la interparolon inter Fèlix Martí, honora prezidanto de la Unesco-Centro de Katalunio kaj de la Instituto Linguapax, Arcadi Oliveres, prezidanto de la organizo Justeco kaj Paco kaj instruisto pri ekonomiko ĉe Universitat Autònoma de Barcelona, kaj la socilingvistino Maria Àngels Viladot, instruisto ĉe Universitat Oberta de Katalunio.

La ciklon partoprenis kreskanta publiko, de ĉ. 20 homoj en la unua sesio ĝis ĉ. 40 en la tria kaj lasta. Ĝi vigle intervenis fine de ĉiu kolokvo, kion la tabloj tre aprezis. Entute la aranĝo tre favore impresis la partoprenintajn fakulojn, kaj certe helpis plikonsciigi la publikon pri la graveco de la lingva diverseco kaj ĝia kontribuo al la paco, kvankam, bedaŭrinde, inter la ĉeestantoj neesperantistoj ne abundis. Ĉiokaze, ĝi permesis la kontaktadon de A Giridhar Rao, reprezentanta UEAn, kaj la potencaj organizoj bazitaj en Katalunio Linguapax kaj Linguamón. Tion sekvis, ke la sekvan merkredon Antoni Mir akceptis lin kaj Ferriol Macip, sekretario de Kataluna Esperanto-Asocio (KEA).

Krome, 3 nov Ferriol Macip kaj A Giridhar Rao partoprenis en la prezentado de la dekalogo “Estu lingve daŭripova”

ĉe Universitat Autònoma de Barcelona. Temas pri projekto lanĉita de la lingvaj servoj de ok katalunaj universitatoj, kiu celas diskonigi inter la universitata komunumo la gravecon de la lingva diverseco. Pete de la lanĉintoj, la dekalogo estis tradukita al Esperanto kaj Ferriol Macip parolis dek minutojn dum ties prezentado pri la laboro de la esperantistaro en rilato al la lingva diverseco.

### Eldon-agado

Tiu laboro inkluzivas ankaŭ la eldonon de kolekto *Delfi Dalmau*, prezentita dum la rondaj tabloj kaj la kongreso. Ĉi tiu broŝur-kolekto de KEA aperigas en la kataluna lingvo tekstojn rilatajn al la lingvaj rajtoj kaj la lingva diverseco. Per sia nomo ĝi omaĝas Delfi Dalmau i Gener (1891–1965), pedagogo kaj lingvisto, fondinto de reto de eduk-centroj, prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio dum la 1920aj jaroj kaj pioniro de la socilingvistiko en Katalunio.

La kolekto komenciĝas per kvar kajeroj: tri estas tradukoj de Esperanto-Dokumentoj de UEA (teksto de Robert Phillipson kaj intervjuoj al Martinet kaj Eco), dum la kvara kunigas artikolojn aperintajn en *Kataluna Esperantisto* sub la titolo *Esperanto kaj lingvaj rajtoj. Kolekto de artikoloj 2005–2008*. La kolekto daŭrigos per ritmo de po 2–3 novaj eroj jare, kiuj estos senditaj, kiel aliaj nacilingvaj eldonoj de KEA, al tri-deko da universitatoj en la Kataluna Landaro kaj vendataj en la ĉefa librovendejo pri lingvoj de Barcelono.

Krom la Dalmau-kvaropo, estis prezentita en la kongreso la libro *La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono* de la historiisto Francesc Poblet i Feijoo. Temas pri populariga verko dulingva en la kataluna kaj Esperanto, en kiu la aŭtoro prezentas la mirindan agadon de la kataluna Esperanto-movado inter la jaroj 1909 kaj 1912, dum kiuj Esperanto fariĝis socia fenomeno. La verko daŭrigas lian antaŭan samformatan verkon *La komenca Esperanto-movado en Katalunio*, aperintan kvar jarojn antaŭe. En la venontaj du jaroj estas planitaj du novaj verkoj en la dulingva kolekto pri historio de KEA.

Per tiuj agadoj KEA fermas sian festadon de la Internacia Jaro de Lingvoj kaj komencas tiun de la Centjariĝo de la 5a Universala Kongreso en Barcelono, kies kvar ĉefaj aranĝoj koncentriĝos inter la 23a de aprilo kaj la 3a de majo.

**Gazetara Servo de KEA**

## Pri lingvaj rajtoj en Florenco

25 nov en Florenco en la historia Palazzo Vecchio Itala Esperanto- Federacio (IEF) aranĝis kunvenon pri Homaj Rajtoj kaj Lingvaj Rajtoj okaze de la jaro 2008, Internacia Jaro de Lingvoj. La kunveno esti aranĝita kun la kunlaboro kaj la aŭspicioj de Accademia della Crusca (Akademio pri la itala lingvo), la Nacia Unesko-komisiono, la urbo Florenco kaj la Accademia Eurolinguistica-sud (eŭropa asocio de lingvistoj).

Parolis pri “Homaj Rajtoj kaj Lingvaj Rajtoj” la honora prezidanto de “Crusca”, Francesco Sabatini, fama itala lingvisto, kaj ok aliaj profesoroj el pluraj italaj kaj svisaj universitatoj.

Estis tuŝitaj pluraj temoj, de la decido de la Tribunalado de EU kontraŭ la decido aperigi anoncojn pri dungado de funkciuloj nur en la angla, franca kaj germana al la rolo de la araba en UN.

Ĉiuj neesperantistoj agnoskis la rolon de Esperanto por protekti lingvaj rajtojn en la kadro de samrajta internacia komunikado.

Laŭ *Informitale*

## La voĉoj de la paco

28 nov en “Teatro Sperimentale” en Ancona estis por la sepa fojo disdonitaj la premioj Zamenhof (La voĉoj de la paco) kaj Umberto Stoppoloni (La neblaj integriĝoj).

Ĉi-jare la Premio Zamenhof konsistas el bela skulptaĵo de la konata skulptisto Floriano Ippoliti. Ilin ricevis:

— Lella Costa pro ŝia engaĝiĝo kiel aktorino kaj kiel civitanino por kulturo de paco, kiu elaçetu la homkondiĉon de la katenoj de maljustecoj, diskriminacioj kaj aroganteco de povo.

— Ernesto Olivero (fondinto de SERMIG en Torino) pro lia sindediĉo al kredo, kiu fariĝas kompleta engaĝiĝo de propra vivo por helpi la flankemetitojn en plena respekto de kulturoj kaj de religioj.

— Centro de Volontuloj el regiono Marche, asocio kiu kunigas idealecon kaj konkretecon en sia batalo kontraŭ malriĉecon kaj mizeron pere de gravaj sociaj kaj substrukturaj intervenoj en la Tria Mondo kaj pere de vera engaĝiĝo favore de interkultureco.

La premion Stoppoloni ricevis la asocio “Libera — Asocioj, nomoj kaj [telefon-]numeroj kontraŭ ĉiaj mafioj”, kuniganta asociojn batalantajn por laŭleĝeco kaj defendo de la malfortuloj.

Laŭ *Informitale*



La kunveno pri homaj kaj lingvaj rajtoj en Florenco estis la plej solena evento omaĝe al la Internacia Jaro de Lingvoj 2008 en Italio. (Fotis Marco Menichetti)

## Kubo: Esperanto kaj Unesko

La konferenco *Esperanto kaj Unesko* okazis 18 nov 2008 en la sidejo de la Kuba UN-Asocio kiel parto de la omaĝoj al la Internacia Jaro de la Lingvoj deklarita de la ĝenerala asembleo de UN.

La konferencon prezidis konstanta sekretariino de la Kuba Unesko-Komisiono Susana Sardiñas, prezidanto de la Kuba Esperanto-Asocio Julián Hernández, kaj Abdel Fattah Ezzeldin — la ambasadoro de Egiptio en Havano.

Kvindeko da partoprenantoj aŭskultis prelegojn de KEA-estraranoj Juan Ramón Rodríguez kaj Maritza Gutierrez pri la historio kaj nuntempo, respektive, de la rilatoj inter Esperanto (UEA) kaj Unesko, kaj pri la perspektivoj kunlaboraj kadre de la celoj de ambaŭ institucioj internaciaj.

La reprezentantino de la kuba Unesko-komisiono pritraktis diversajn aspektojn de la nuna laboro de la Unesko kaj aparte de la kuba komisiono rilate al lingvaj temoj kaj projektoj, en kiuj Esperanto povus kunpartopreni. Ŝi komentis pri projektoj de la kuba komisiono pri protektado de indiĝenaj lingvoj, kadre de la agado de la Movado de Nealiancistaj Landoj, kiun Kubo prezidas nuntempe, kaj same pri aliaj temoj kiel alfabetigado. Ŝi esprimis intereson pri kunlaboraj projektoj kun KEA.

Oni konfirmis la celon komunan protekti la gepatran lingvon kiel esencan elementon de identeco kaj strategian faktoron por daŭrigebla evoluo, ĉar ĝi konsistigas la vojon al nova erao, en kiu ĉiu popolo kaj ties lingvo havu samajn rajtojn ekzisti kaj krei pli justan socion.

Laŭ *Informitale*

## A7: Ĉiusemajne pri Esperanto

Oni devas ege danki al Franz J Fortuny Loret de Mola, esperantisto el Mérida (Jukatano/Meksiko), kiu sukcesis aperigi en ĉiu numero de la nova gazeto A7 artikolon rilate al Esperanto.

*Artículo 7* aŭ simple *A7* estas semajna gazeto kiu aperas en Mérida ekde 7 jun 2008 en eldonkvanto de 15.000 ekzempleroj. En ĉiu numero aperis en la rubriko *Libera Tempo* artikolo jen pri la ideo de Esperanto, jen pri la gramatiko, jen pri la uzo de Esperanto.

Ekzemple, en la ĵus aperinta numero 26, Franz raportas pri la vizito de Christiane Altrogge el Germanio kaj Daniela Deneva el Bulgario al Mérida kaj al la majaa zono. La aŭtoro montras kiel utila Esperanto povas esti kaj proponas al la legantoj aliĝi al la tutmonda movado.

Ĉiujn priesperantajn paĝojn de A7 oni elŝutu ĉe la retpaĝo de Meksika Esperanto-Federacio <http://www.Esperanto-mexico.org/eo/taxonomy/term/2>.

Martin Schäffer

**Esperantistas de Alemania y Bulgaria visitan zona maya**

**Crucigrama**

**Sudoku**

## Kompreneble vi povas... kurson

24–26 okt okazis unuafoje kune en Wedgwood Memorial College, Barlaston, Britio, la de kelka tempo regula aranĝo “Course-you-can” (vortlude aŭ “Kompreneble vi povas” [Esperanton lerni] aŭ “Kurson vi povas” [ĉeesti]) por komencantoj kaj la relative nova “Dron-do” (rondo por demokrata diskutado) por pli spertaj uzantoj de la lingvo.

Malcolm Jones gvidis CYC, kaj ĝuis la ĉeeston kaj kunlaboron de ok komencintoj: ĉiuj jam antaŭe faris unuajn paŝojn, aŭ per la poŝtaj kursoj de EAB aŭ per lecionoj ĉe “lernu.net”. Ŝercaj rakontetoj, enigmoj, lingvaj ludoj kaj kanto de Ĵak le Puil provizis bazon por paroligi la studentojn kaj vastigi ilian vortostokon; aldoniĝis laŭokaze pritrakto de la prononcado, la korelativoj, diversaj “falsaj amikoj”, ktp. Aparte amuzis la rollegado de la ses teatraĵetoj *Nun ni komprenas... kaj aliaj* verkitaj de Paul Gubbins por akompani la infanan kurson *Springboard to Languages* — ja taŭga materialo ankaŭ por plenkreskaj lernantoj, kiuj volonte leoniĝas, robotiĝas, dentobrosiĝas, perskribile tiklas la dorson de iom sentema poŝtkarto...

Derek Tatton, antaŭa estro de la kolegio, estris la Dronon: deko da homoj kunvenis por diskuti diversajn temojn, pri kiuj ili jam antaŭe ricevis foliojn kun fonaj informoj kaj diskutvekej demandoj. Temis i.a. pri Civitaneco, La monda financa krizo, “Mona Lisa”, Aprezo de vino kaj de poezio... Seriozeco montriĝis rilate la pritrakton de la temaro, sed tio ne malpliigis la ĝuon de la interdiskutado, kaj ofte aŭdeblis ridado post iuj interŝanĝoj...

Esperanto estis la ĉefa lingvo ankaŭ dum la libera tempo, ĉe la manĝotablo kaj dum vizitoj al la biblioteko Butler,

aŭ al la oficejo kaj librovendejo de EAB. La “komencantojn” oni tamen iom indulgis, kaj la angla estis por ili ankoraŭ tolerata, sed ili ne povis eviti la konstaton, ke Esperanto estas vera vivanta lingvo — kun vere vivantaj uzantoj!

Nova iniciato estos plia CYC jam en januaro: “Course-you-can... Jan”. kiun gvidos Stephen Thompson, konata multjara, multflanka samideano. Denove la komencantoj povos sperti altgradan uzon de la lingvo, pro la samtempa okazigo de “Ni festivalu!”, en kies kadro okazos “Ni teatrumu!”. La studrondo pri Esperanto-teatro, sub la gvidado de Paul Gubbins, turnos atenton al la verkoj de d-ino Marjorie Boulton, aparte al *Provludo en la klubejo*, kaj ĝenerale al komedioj.

Detaloj de ĉi tiuj venontaj eventoj troveblas en la angla ĉe: <http://www.esperantoeducation.com/residential.html>

**Malcolm Jones**

## TILE: Daŭrigi la someron

Komence de novembro en Soĉi, la urbo de la vintra Olimpiko en 2014, estis organizitaj Tagoj de Internacia Lingvo Esperanto (TILE-4) al la aranĝo venis 11 aliurbaj gastoj kaj 10 soĉianoj, gvidataj de Vladimir Bepalov.

La gastojn allogis la ebleco daŭrigi la someron, renkonti esperantistojn kaj ripozi.

La programo enhavis prelegon de Vladimir Kosolapov pri dolmenoj, seminarion pri kluba agado, promenadojn tra la urbo kaj en montaro, koncerton de Sergej Sergejev kaj koncerton de ensemblo de rusaj popolaj muzikiloj, viziton al la Arbo de Amikeco...

**Margarita Karceva**

## Esperanto ĉe la portugala PEN

15 nov 2008 ĉe la Portugala PEN-Centro en Lisbono okazis densa literaturo vespero, prezidata de Casimiro de Brito, poeto kies famo etendiĝas al Japanio. Lia kolego Giorgio Silfer prelegis pri la originala literaturo en esperanto, kun aparta fokuso al ĝiaj originoj. La publiko estis tre interesata pri la konsisto kaj deveno de la unua generacio de esperantistoj, fine de la dek-naŭa jarcento.

En la diskuto Giorgio Silfer (kies kandidatecon kiel internacia sekretario de PEN-Klubo subtenis ankaŭ la portugala centro) parolis pri la ĉeesto de esperanto en la portugallingva literaturo, ekzemple la figuro de la alkemiisto en la samtitola romano de Paulo Coelho, kaj ankaŭ pri la ĉeesto de la portugala en nia traduka ĝenro, por kiu interalie aktivis lastatempe *La Karavelo*.

Demandite pri la dezirinda de pli da “portugaleco” en la esperanta kulturo, Giorgio Silfer respondis ke, precipe, li bedaŭras la minimuman atenton de la esperanto-kanzono al la melodieco de la portugala. Kaj li pensas ne tiom pri la faduoj, kies eminenta interpretistino estis Amalia Rodrigues, kiom pri la kantoj de Vitorino. Giorgio Silfer mem intencas baldaŭ labori super tio.

La diskuto, kiu daŭris ĝis la noktmezo, involvis ankaŭ la internan strukturon de PEN-Klubo kaj la futuron de tiu grava internacia kaj sendependa neregistara asocio.

**HeKo**

## La 20an fojon en Morbecque

La 20a Eŭropa Rendevuo disvolviĝis dum tri tagoj, de la 7a ĝis la 9a de novembro en Morbecque (Francio), kun 87 partoprenantoj el ok landoj. Krom la kursoj diversnivelaĵ, prelegis Edmond kaj Arlette Plutniak pri sia eksterordinara vojaĝo per trajno de Moskvo al Jokohamo, kaj Mikaelo Bronŝtein pri la ĉefurboj de Ruslando.

La fama magiisto Trixini ravis la spektantaron per siaj magiaĵoj. Bronŝtein kantis esperantlingve kaj ruse. Kiel kutime, la belga klubo de Gent proponis riĉan libro-servon.

Dum tri tagoj, esperantistoj el Belgio, Britio, Ĉeĥio, Germanio, Luksemburgio, Portugalio, Ruslando kaj Francio vivis kune kaj fratece en varma etoso dank’ al Esperanto, kiu faciligas la rilatojn inter homoj diverslandaj.

**Richard Valet**



Grupfoto en Morbecque



## Paraiba Valo, denove

La lastan novembran tagon okazis en la urbo Resende, ŝtato Rio, la 74a Renkonto de Esperantistoj en la Paraiba Valo

Pro speciala klopodo de Willy Salles, akceptis nin la komforta sidejo de la loka komerca asocio ACIAR. Post salutoj kaj legado de la protokolo, oni informis pri pluraj okazaĵoj en la regiono, inkluzive de instruado de Esperanto en oficiala kadro de Lernejo en la proksima urbo Tri Riveroj kaj en privata universitato en la urbo Vassouras.

Paulo Carvalho prelegis pri la movado en Rio, Carlos Valle prelegis tre atentoveke pri “Muziko — la alia universala lingvo” kaj Paulo S. Viana prezentis “Guton da Gramatiko”. Post deklamoj de Sylla Chaves, oni intervjuis samideanojn Aloísio Sartorato kaj Givarnildo Costa. Dum la renkonto Kultura Kooperativo de Esperantistoj el Rio proponis libroservon.

La sekva renkonto okazos en la urbo Jameiro, ŝtato San-Paŭlo, en marto 2009.

**Paulo Sérgio Viana**

## 700 vortaroj venditaj dum monato

(Esper-german) Laŭ informo de la eldonejo *Marix Verlag*, en la unua monato post ĝia apero vendiĝis jam 700 ekzempleroj de la nova dudirekta vortaro *Kleines Wörterbuch Deutsch-Esperanto / Esperanto-Deutsch*. Oni trovas stokojn de la 255-paĝa libro ankaŭ en ordinaraĵ librovendejoj, ekzemple en la ĉefaj stacidomoj de Frankfurto kaj Majenco. (En Frankfurto mi trovis kvar ekzemplerojn okulfrappe prezentitajn en la lingva sekcio de la librovendejo *Schmitt & Hahn* sub la ĉefa enirejo de la stacidomo, kaj en Majenco eĉ naŭ ekzemplerojn, kiujn la vendejo *Relay* stakigis sur aparta tablo de *Marix Verlag*.)

La konataj neesperantistaj retaj libroservoj povas tuj liveri la vortaron. Ĉe bol.de (<http://www.bol.de>), kiu ofertas librojn sen fakturi sendokostojn, ĝi dum kelka tempo estis inter la 5.000 plej vendataj libroj.

Oni do povas supozi, ke la eldonkvanto de 4 mil ekzempleroj ne estis tro alta. Verŝajne la vortaro fariĝos simila sukceso kiel la lingvogvidilo *Esperanto — Wort für Wort* de Klaus Dahmann kaj Thomas Pusch, de kiu dum 14 jaroj vendiĝis 10 mil ekzempleroj.

**Ulrich Matthias**

Ronda tablo okaze de la dua IRIS-festivalo (Szolnok, Hungario), nova unusemajna amas-evento dum kiu HEA-membroj ricevis kompletan provizadon senpage.

De maldekstre: Klára Mikola — estraranino, József Baksa — prezidinto, nun estrarano, Imre Szabó — prezidanto, Andrea Horváth — estraranino.



## Novaj vojoj konstrui la movadon

Almenaŭ tiel kredas la nova estraro de Hungaria Esperanto-Asocio (HEA) elektita en novembro 2008, kies membroj plejparte de 2006 gvidas la ĉiutagojn de la landa organizo.

En 2008 HEA iĝis unu el la plej grandaj Esperanto-organizoj el la mondo. Ĉar HEA havas pli ol mil aligitajn membrojn al UEA, ĝi rajtas je du reprezentantoj en la komitato de UEA. La membraro de la landa organizo aktuale estas pli alta ol 1300 personoj (kune kun la aliĝintaj anoj de enlandaj membro-organizoj).

La nuna strukturo de HEA similas al konsorcio de diversaj organizaĵoj fonditaj ne nepre por servi ekskluzive Esperanton, sed ili ĉiuj senescepte konsentas pri la uzado de Esperanto por atingi siajn celojn. Do la membroj de aliĝintaj societoj — kvankam ili utiligas Esperanton — ne estas devige individuaj membroj de HEA.

Danke al Jozsef Baksa, prezidinto de HEA inter 2006–2008, nun estrarano, la Asocio sukcesis akiri signifoplenajn subvenciojn ŝtatajn, per kioj ĝi ne nur preterlasis siajn antaŭjarajn financajn mizerojn, sed nun planas strukturajn evoluigojn, elpensas jardaŭran strategion pri komunikado kaj partoprenas en pli da eventoj civilaj dise en Hungario.

Ŝajnas promesoplana iniciato la serio de rondaj tabloj organizataj dise en la lando pri la uzebleco de Esperanto en lokaj, regionaj, interregionaj kaj internaciaj kunagadoj de civilaj organizaĵoj. En 2008 okazis preskaŭ ducento da tiaj eventoj, kio havas kroman mesaĝon: laŭ la nuna estraro la movado ne nepre devas koncentriĝi ĉirkaŭ la ĉefurbo.

HEA volas servi siajn membrojn, ne nur atendi oferaĵojn de ili. Tiucele funkcias poŝtelefona E-grupo/reto; tiun servon ĝuas pli ol 600 personoj, kiuj havas

ian koneksojn kun Esperanto, alikaze ili ne povus aliĝi al tiu grupo. La membro ricevas senpage aŭ altrabate telefonilon, kaj ili povas telefoni inter si senpage, ekstergruppen laŭ signife pli malaltaj tarifoj ol kutime.

Imre Szabó, la nova prezidanto jene deklaras pri la novtipa agado de HEA: “Pli bonas ĉeesti surloke komunumajn ĉiutagojn, ol deklari kiel unusola aŭ ununura la servon de movado kaj Internacia Lingvo. Se anstataŭ nura okupiĝo pri Esperanto inter kvar muroj, oni volas servi ankaŭ lokajn komunumojn, do la socion — ne kontraŭ, sed per Esperanto!” Espereble helpos tiujn ĉi celojn ankaŭ nia novaĵretejo *Esencoj* ([esen-coj.info](http://esen-coj.info)) kaj la nova retpaĝo de HEA atingebla ĉe la adreso [eszperanto.info](http://eszperanto.info). Post unu jaro ni povos diri pli multe pri niaj sukcesoj-malsukcesoj...

**László Szőke**

Respondeculo pri komunikado de HEA

## Por esperanto-verkistinoj

Kultura Centro Esperantista kaj Feminisma Esperanta Movado proponas la unuan Atelieron por Esperanto-Verkistinoj: pasigi semajnon kune en la Esperanto-Domo de Ĉaŭdefono kaj trejni sin al verkado, ĉu proza ĉu poezia.

La kontribuo de virinoj al la esperantaj literaturo kaj publicistiko estas ankoraŭ tro malforta. FEM volas stimuli la kvalitan kreskon de niaj verkistinoj, sendepende de la aĝo. Tial kun KCE ĝi proponas prioritare al virinoj ĉi tiun iniciaton, kiu konsistas el prepara koresponda kurso, sekvata de surloka trejnadado en la semajno ĉirkaŭ Pasko 2009. La aliĝo al la prepara retkurso estas senpaga por FEM-anoj, kostas kvindek svissajn frankojn por la ceteraj (se vi havas la esperantan civitanecan, vi rajtas je 10-procenta rabato).

**HeKo**

## Unufraze

★ 6–7 nov en la kunveno “English Only”, organizita de la Goethe-Institut en Bruselo, Seán Ó Riain informis pri la agado de EEU k starigis multajn utilajn kontaktojn. (*Eŭropa Bulteno*)

★ La Gdanska filio de PEA partoprenis ĉi-aŭtune la Festivalon de Mondkulturoj, organizitan de Ĉebalta Kultur-Centro, per standoj k ekspozicioj, artpogramo de infanoj el la Gdanska lernejo №50, leciono de Eo k strata opiniosondado pri Eo: inter 120 demanditoj 85 sciis ion pri Eo k 35 sciis nenion. (*Pola Esperantisto*)

★ La Esperanta PEN-Centro per prelego “Tri mil lingvoj mortontaj: kaj la via?” de Giorgio Silfer, preparita kun Perla Martinelli, kontribuis al la programo de la festivalo *Ex Border* en Goricio fine de novembro. (HeKo)

★ Informstando pri Eo k ekspozicio *Esperantlingvaj libroj pri Orientoj* estis aranĝitaj en la oktobra Festivalo de Sciencoj en Varsovio. (*Pola Esperantisto*)

★ Ekde la lernojaro 2008/2009 en la Erevana Pedagogia Universitato de Scenarto (Armenio) Eo estas akceptita kiel studobjekto en la unua studjaro; ĝin instruas Kamarnik Gevorgjan k Susanna Gevorgjan. (Landa Agado)

★ Grupo *Studo kaj Disvastigo de la Lingvo Esperanto* en Alfenas (Brazilo) en la loka universitato UNIFAL-MG okazigas E-kurson, kies diplomitoj akiras kromajn poentojn en municipaj oficialaj konkursoj. (*BEL Informas*)

★ Prelegoj pri Eo k elementa E-kurso estas antaŭviditaj en programo de la nova Universitato de la Tria Aĝo en Pelplino (Pollando), inaŭgurita 1 okt 2008. (*Pola Esperantisto*)

★ 8–10 nov en la provinco de Pisa (Italio) okazis filmado de la speklaklo *Doktoro Esperanto* de Mario Migliucci. (*Heroldo de Esperanto*)

★ En grava filatela ekspozicio, kiu okazis ĉi-novembre en Campinas (Brazilo) estis montrita 80-folia kolekto *Babelo estu detruita* de e-isto James Pitton; ĝi konsistas el poŝtmarkoj, poŝtaj stampoj, oficialaj poŝtaj kartoj k aliaj poŝtaj dokumentoj. (*BEL Informas*)

★ Okaze de la Eŭropa E-Kongreso je la venont-jara Pentekosto en Herzberg okazos granda Esperanto-ekspozicio en la Kavalira Salono de la bela, historia Kastelo Herzberg k speciala ekspozicio kun raraj E-kolektaĵoj k E-filatelaĵoj en la urba biblioteko. (GEC/ICH)



## Jansen nomumita profesoro

D-ro Wim H. Jansen (*vidu la supran foton*) estas nomumita speciala profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Fakultato de Homaj Sciencoj de la Universitato de Amsterdamo (UvA). La katedro estas kreita de la Fondaĵo Internacia Esperanto-Instituto.

Wim Jansen fokusigas sian instruadon al interlingvistiko kaj la akirado de la lingvo Esperanto. Lia esploro ĝis nun koncentriĝis en la sintakso kaj tipologio de Esperanto. Jansen finstudis pri aviadilkonstruado en Delft (1970) kaj pri kompara lingvistiko en Leiden (1989).

Post kariero en la eŭropa astronautiko li aktiviĝis kiel publikigisto kaj lingvoinstruisto en plenkreskula edukado. Ekzemple, li publikigis la unuan vortaron eŭskan-nederlandan. Ekde 2002 Jansen estis universitata instruisto pri Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe UvA. Li verkis tezon pri la vortordo en Esperanto, per kiu li promociiĝis en 2007 ĉe UvA.

**Atilio Orellana Rojas**

## Kongreso en Nepalo

La 10a kongreso de Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) okazis 15 nov 2008 en Padmakanya School, Dillibazar, Katmando. Partoprenis 62 esperantistoj, pli ol duono de la tuta membraro de la asocio.

La programo estis dividita en du sesioj. La unua sesio komenciĝis per la kantado de la himno *La Espero*. Poste Mukunda Raj Pathik anoncis unuminutan silenton memore al la forpasinta prezidantino de NEJO, Apsana Giri, kaj Narandra Bhattraï bonvenigis la kongresanojn. Mukunda diris kelkajn vortojn

pri Esperanto kaj la historio de NEspA. Philip Pierce legis la rakonton pri la turo de Babel kaj diris kelkajn vortojn pri ĝi. Indu Devi Thapaliya rakontis pri sia partopreno en la kurso NASK kaj en la Universala Kongreso en Nederlando.

Post tralego de salutmesaĝoj regionaj reprezentantoj parolis pri siaj agadoj, planoj kaj sugestoj. La jara kaj financa raportoj estis prezentitaj de, respektive, Bharat Ghimire kaj Posh Raj Subedi. Membroj komentis, demandis kaj fine aprobis ambaŭ raportojn. Membroj dankis al L.P. Aghihotri kaj Philip Pierce pro monprunto por ebligi aĉeton de terpeco ekster la urbo. La unua sesio finiĝis per parolado de la kunvenestro, Razen Manandhar, la prezidanto de NEspA. Je la fino li eksigis la estraran komitaton de la pasintaj du jaroj.

En la dua sesio oni elektis novan estraron de NEspA. Por la venontaj du jaroj estas elektitaj: prezidanto: s-ino Indu Devi Thapaliya; vicprezidantoj: Narendra Raj Bhattarai, Posh Raj Subedi; ĝenerala sekretario: Bharat Kumar Ghimire; sekretario: Himlal Parajuli; kasisto: Shree Prasad Pokharel; membroj: Parasar Rijal, Navin Lal Shrestha, Rudra Adhikari, Shakuntala Dhakal, Bhagavati Adhikari.

**Bharat Kumar Ghimire**

## La sesa LF en Uljanovsk

29 nov 2008 en Uljanovsk (Ruslando) okazis la 6a Lingva Festivalo. Ĝin kunorganizis la Uljanovska Esperanto-klubo kaj la urba pedagogia universitato. Kutime LF-oj en Uljanovsk okazas printempe, sed ĉi-jare aperis ebleco organizi ĝin dufoje. Kelkcent partoprenantoj ĉeestis en la prezentoj de pli ol 20 lingvoj. Post kvar blokoj de prezentoj okazis internacia koncerto.

Al la festivalo estis invititaj honoraj gastoj. Irina Gonĉarova, la organizanto de la Moskva LF, rakontis pri sia sperto kaj pri metodikoj de lingvolernado. Aleksandr Blinov, la iniciatinto de LF-oj en Ruslando, faris lingvan kvizon. Aleksandr Ĥrustaljov kantis dum la koncerto kaj kadre de aliaj programeroj. La perlo de la Festivalo estis mondvojaĝanto Vladimir Savinov (*vidu foton sur pĝ. 27*).

Unuafoje la Festivalo daŭrigis sian programon dum la sekva tago. En la Esperanto-klubo okazis ronda tablo “Kiel lerni lingvojn” kun partopreno de la honoraj gastoj kaj instruistoj de la festivalo.

**Yurij Karcev**

## Eŭropo kritikas Hispanion pro lingva diskriminacio

de Dafydd ab Iago el Bruselo

**La Konsilio de Eŭropo en Strasburgo publikigis sian duan raporton fine de la jaro pri la situacio de la malpli ofte uzataj lingvoj en Hispanio.**

Surbaze de la raporto la komitato de ministroj — kiu reprezentas la ŝtatojn de la tuteŭropa internacia organizo — alvokas Hispanion plibonigi la uzadon de la regionaj kaj minoritataj lingvoj ĉe la justicaj kaj ŝtataadministrataj instancoj.

“Pli da klopodoj estas necesaj por protekti la asturan, kaj specifa leĝaro devas esti akceptita por la aragona kaj kataluna lingvoj en Aragono”, — rekomendas la Konsilio, kies raporto instigas la hispanajn aŭtoritatojn “klarigi la statuson de la galega lingvo en Kastilio kaj Leono, de la portugala en Olivenca, de la berbera en la aŭtonoma urbo Melilla kaj de la araba en la aŭtonoma urbo Ceuta”.

La raporton preparis komitato de sendependaj ekspertoj, kiuj sekvas la aplikadon de la Eŭropa Ĉarto de regionaj kaj minoritataj lingvoj. En Hispanio la ĉefa respondeco pri la aplikado de la Ĉarto restas ĉe la aŭtonomaj komunumoj kiel Madrido, Valencio, Katalunio, Galegio kaj Eŭskio. Tamen la ekspertoj memorigas, ke la hispana registaro havas superrigardan aŭtoritaton pri la afero. Ĉi tie la ekspertoj

bedaŭras la “certan” mankon de kohereco.

“En kelkaj kazoj, la aŭtonomaj komunumoj povas malfaciligi la aplikadon de la Ĉarto”, — notas la ekspertoj. Alia manko estas la nekunlaborado inter regionoj kun la sama lingvo, ekzemple, Katalunio kaj Valencilando (kvankam la lingvo nomiĝas kataluna en Katalunio kaj pli malpli “valencia” en Valencilando).

Alia problemo estas la manko de politiko por promocii ekster Hispanio la ideon pri Hispanio kiel plurlingva ŝtato. “La aŭtoritatoj de Eŭskio notas, ke la eŭskaj lingvoj kaj kulturo ne estas ententataj en la agado de Instituto Cervantes”, — atentigas la ekspertoj.

Tamen la plej grava manko rilatas al la jura sistemo. Laŭ la ekspertoj, ĝi estas unu el la ĉefaj punktoj, kiuj malhelpas Hispanion komplete plenumi siajn internaciajn devojn laŭ la Ĉarto. Estas “struktura” problemo spite al la nova leĝo (akceptita en decembro 2003) pri la juĝaro. Kvankam la nova leĝo enkondukis kelkajn plibonigojn, la plenumado estas nesufiĉa je la ŝtata nivelo. La ekspertoj atentigas, ke la koncerna organo en Hispanio, la Ĝenerala Konsilio de la Juĝaro, montris ĝis nun nenian intencion movi sin al plibonigo.



**Burgos.** Ankaŭ en la aŭtonoma regiono Kastilio kaj Leono la galega estas parolata. (Foto de la Aŭdvida Departemento de EK).

La ekspertoj de la Konsilio notas, ke ja ekzistas formala rajto uzi la regionajn lingvojn en la nuna jura kadro. La hispana juĝaro ankaŭ postulas de kelkaj oficistoj montri konon de unu el la kunoficialaj lingvoj (kataluna, galega kaj eŭska). Tamen la leĝo ne fiksas tiun postulon por juĝoj kaj magistratoj. Ĉi tio malfaciligas la plenumadon de la promesoj donitaj de Hispanio.

## Esperanto en la etero

La unua Internacia Kongreso de Radio, okazinta en 1925 en Parizo, akceptis Esperanton kiel internacian helplingvon egale uzebla kiel aliaj lingvoj. Tiun rezolucion konfirmis en 1927 la Internacia Unio de Radio.

Sekve de tiu rezolucio pluraj radiostacioj ekdisendis Esperanto-programojn.

Edmond Privat, iama direktoro de la Svisa Radio, prezidinto de la Universala Esperanto-Asocio kaj iniciatinto de la Esperanto-elsendoj de Radio Bern, ofte klarigis kaj substrekis la valoron de Esperanto en la radio, speciale por grandigi la esperantistaron en la mondo kaj por helpi novajn esperanto-parolantojn. Ankaŭ Ivo Lapenna, prezidinto de UEA, ofte pledis por la subtenado de valoraj Esperanto-akiraĵoj. Tiutempe niaj radio-elsendoj estis regule kaj detale menciitaj en la monata gazeto de UEA... same kiel faras multe da naciaj kaj regionaj ĵurnaloj.

Bedaŭrinde kelkaj esperantistoj efektive ne komprenas la valoron de tiuj elsendoj kiel rimedo por pli bone ellerni la universalan lingvon. Ili ankaŭ ne komprenas la netakseblan valoron de la oficialigo de Esperanto por radiofoniaj celoj, nek la valoron de pene akiritaj radio-elsendoj en Esperanto kiuj tamen pruvas — eĉ antaŭ skeptikemuloj — ke nia lingvo vere vivas.

Ili preferas miopan babiladon kaj infanecajn artikoletojn, pensante ke ili savos tiel la dronantan ŝipon, kiun ili mem traboris per siaj malinteligentaj, senplanaj kaj sencelaj opinioj. Ilia skeptikismo kontraŭ fundamentaj necesoj de la Esperanto-movado estas eĉ pli granda ol la skeptikismo de malamikoj de la universala lingvo.

Kondukante tiamaniere ili rekte malfavoras kaj kontraŭas la progreson de nia homarama lingvo. Tiajn malinteligentulojn ni ne bezonas! Ili malmulte komprenas, estas malbonaj konsilantoj kaj danĝeraj gvidantoj.

Dum multaj jaroj aro da redakcioj fervore kaj senlace klopodis kaj daŭre klopodas diskonigi Esperanton per la radio: Varsovio, Budapeŝto, Parizo, Havano, Vatikano, Hilversumo, Bilbao, Kubo, Beogrado, Romo, Pekino k.t.p., maloftaj oficiale kaj politike rekonitaj Esperanto-atingaĵoj.

Por survivi, la koncernaj redakcioj bezonas regulajn reagojn, se ne — Esperanto malaperas el la etero... kio okazis jam tro ofte, bedaŭrinda perdo por nia movado.

Aŭskultado kaj taŭga diskonigado de Esperanto-radioprogramoj estas do tre rekomendinda, malgraŭ unuopaj antiprogresemaj mensetoj!

Se vi ŝatas Esperanton, se vi amas vian infanon, pruvu ke vi faras ĉion por ke ĝi survivu!

**Prof. J. W. Haazen**

Peterburga Ŝtata Universitato (Ruslando)



## Por pli da altkvalitaj, diverstemaj libroj en Esperanto

**Post la finredakto de la decembra *Ondo* ni ricevis plian reason al la demandoj de nia kvina randa tablo “Ĉu legokrizo (ankaŭ) en Esperantujo?”**

Mi legis kaj relegis la artikoleon *Kial ni ne aĉetas librojn?* (*La Ondo de Esperanto*, 2008, №11) kaj restis kun la sento ke la titolo estas misgvida. Kion ĝi signifas? Ke esperantistoj ne aĉetas librojn? La respondo estas: ili ja aĉetas. Kion signifas “ni” en la titolo? Ĉu temas pri ni la [tuta] Esperanto-parolantaro? Tiam necesas refoje emfazi ke ja, esperantistoj aĉetas librojn. Plej probable ne ĉiuj. Ĉu ĉiuj parolantoj de la rusa aĉetas librojn?

En la enkonduka alineo, la demando estas iom alie vortumita, kaj ĝi havas pli da senco ol la insulta titolo. Al la demando en la alineo, “Kial esperantistoj preskaŭ ne aĉetas librojn?” la artikolo mem donas kelkajn respondojn. Mi pretas veti ke la respondoj al tiu demando estas same multaj kiel la personoj kiuj respondas ĝin. Kaj ĉiuj pravas certa-grade.

Mia supozo estas ke la demando naskiĝis el iu mita kredo ke la Esperanto-parolantaro estus iel, mirakle, supera al la cetera, ne-Esperanta mondo. Tian kredon mi rigardas kun iom da skeptiko. Kaj sekve mi rigardas same ankaŭ la demandon. Feliĉe la demandoj lanĉitaj de *La Ondo* estas iom pli realismaj, eĉ se en la sama demando oni miksas du ne nepre interrilatajn ideojn: aĉetadon kaj legadon.

24 nov 2008 forpasis

### **Marguerite Jaccard (1914-2008)**

aktivulino de la Laŭzana Esperanto-Societo (Svislando), konata ankaŭ kiel Lekanto; ŝi ludis la ĉefan rolon en la filmo de NANDIR *Lekanto al Pekino* (2004).

30 nov 2008 forpasis

### **Ralph Arnold Lewin (1921-2008)**

konata usona mikrobiologo kaj algologo, profesoro pri biologio, aŭtoro de pli ol 250 sciencaj verkoj, inter kiuj ankaŭ kelkaj en Esperanto, plenrajta membro de AIS. Kuntradukinto de *Winnie-la-Pu* de Alan Alexander Milne en Esperanto (1972) kaj redaktoro de *Internacia Vortaro de Mikroba Genetiko* (1994).

La 11an de decembro 2008 forpasis

### **Antanas Garbaskas (1932-2008)**

litova vitralisto, esperantisto ekde 1956. Lia diploma verko *Esperanto — amiko de paco* estis eksponita en la sesa Festivalo de Studentoj kaj Junularo en Moskvo (1957). Li ilustris Esperanto-lernolibrojn, pentris ilustraĵojn kaj afiŝojn pri Esperanto, ornamis Esperanto-klubojn kaj ekspoziciojn.

### **1. Ĉu nuntempe oni efektive aĉetas/legas malpli da Esperanto-libroj ol antaŭe?**

Kvankam oni ja produktas kaj eldonas ankaŭ en Esperanto tre valorajn librojn (multajn ege valorajn kompare kun antaŭaj jardekoj), preskaŭ certe la kvanto de la eldonataj, aĉetataj kaj legataj libroj falis laŭ la paso de la tempo.

Sed tio ne estas trajto nur de la Esperanto-mondeto. Ankaŭ en la ekstera mondo la eldonkvantoj ŝrumpis, ankaŭ tie homoj aĉetas pli singarde kaj legas pli malmulte. Kaj la Esperanto-parolantoj kaj la aliaj havas malpli da tempo por legi librojn. Ni pasigas pli da tempo antaŭ la ekranoj (televidea kaj komputila, kaj, malpli, kineja). Por la nuna rapidema homo estas pli facile kaj komforte pasigi du horojn antaŭ televidilo por spekti filmon laŭ libro por kies legado ŝi aŭ li bezonus plurajn horojn se ne tagojn. Aldone, estas multe pli komforte kaj, certe, multe pli sekure aŭskulti muzikon aŭ voĉlegitan libron dum oni helikas en trafiko ĉe la stirilo, ol legi, kio ofte okazas (kaj eĉ pli ofte okazis) en publikaj transportiloj.

### **2. Ĉu la (supozata) mallegemo/malaĉetemo en Esperantujo havas specifajn kialojn kompare kun la “Granda mondo”?**

Ni ofte ŝatas kompari nin kun la ekstera mondo, forgesante, konscie aŭ ne, ke tia komparo ne ĉiam havas bazon. Kompari ĉiujn parolantojn de etna lingvo kun ĉiuj parolantoj de Esperanto. Sensencaĵo! Plejparto de la parolantoj de etnaj lingvoj loĝas en la medio mem de tiu lingvo, kiu konstante ĉirkaŭas ilin. Ili iras al la kvartala biblioteko, rigardas sur la bretoj, elektas tion kio al ili ŝajnas interesa, portas hejmen, eventuale tralegas tion kaj, se ili vere ŝatas la libron, ili iras sekvatage al la librovendejo kaj aĉetas aŭ mendas la libron. Ili jam vidis ĝin, trafolumis ĝin. Ili scias kion atendi. Ĉu tio eblas kadre de la Esperanta parolantaro?

La Esperanto-parolantoj estas parolantoj de minimume du lingvoj. Ili devas dividi siajn ŝatojn rilate kultur(iĝ)on inter la diversaj lingvoj, kaj por tio ili, probable, havas difinitajn kvantojn de tempo kaj mono, dividitajn laŭ personaj prioritatoj. Ĉar plejparto de la homoj estas unulingvaj, aŭ apenaŭ balbutas fremdan lingvon, kompari nin kun ili ne havas sencecon.

### **3. Ĉu la situacio en nia libromerkato estas plibonigebla? Se jes, kiel?**

Tiu ĉi parto de la respondo probable plej taŭgus sub 1, sed mi preferas ĝin ĉi tie por povi respondi la trian demandon.

Inter la kialoj pro kiuj, supozeble, oni ne aĉetas pli da Esperanto-libroj estas: la Esperanto-komunumo ŝajnas ne esti aparte riĉa (finance); la fakto ke el sia por-Esperanta buĝeto oni ne povas kaj membri en Esperanto-organizaĵoj kaj aĉeti librojn (kaj aliajn esperantaĵojn) kaj aboni Esperanto-periodaĵojn kaj partopreni Esperanto-aranĝojn; la relative alta prezo de niaj libroj (kun la emfazo ke la prezoj postulataj de kelkaj eldonejoj estas simple insultaj), kaŭzita de la magraj eldonkvantoj; nesufiĉe da libroj por ĉiuj (sociaj, politikaj, religiaj, eduknivelaĵ) tavoloj de la Esperanto-parolantaro.

Interalie, por plibonigi la situacion de nia libromerkato necesas havi pli da finance bonfartaj anoj, pli da (persona) mono buĝetita por Esperantaj libroj, pli da altkvalitaj, diverstemaj libroj en Esperanto, kiuj kostu malpli. Kaj jes ja, probable, helpus pli da emo legi en lingvo, kiun ni mem elektis.

**Ionel Oneț**

Libroservo de UEA (Nederlando)

## Ĉu utopio, aŭ ĝusta vojo?

Mi ne scias, kiu estas la komitatano Z, sed lia kolumno en la decembra *Ondo* pensigis min. Li mencias la Akademion Internacian de la Sciencoj San Marino (AIS), kiu agonias, ĉar la fondinto Helmar Frank ne plu aktivis. La “Z”, damne, pravus. Li pravus ankaŭ koncerne de Paul Neergard kaj Akademio Comenius. Sed, ĉu tio signifas, ke tiuj du Akademioj estas malbonaj aŭ malĝustaj?

La celo de Neergard, kunigi la plej elstarajn sciencistojn el universitatoj kaj akademioj mondvaste, por pridiskuti kaj publikigi fakajn temojn en *Esperanto*, ja estis intenco nobla kaj entute ne kurioza. Precize la saman principon havas ALF (Academia Latinitati Fovendæa), kiu kunigas profesorojn kaj akademianojn parolantajn latine. Nur escepte rajtas membriĝi homoj, kiuj ne havas la postulatan rangon, sed jes ja grandajn meritojn pri la movado. Estas ekster ajna dubo, ke la revo de ĉiu serioza latinisto estas membriĝi en ALF, kies kongresoj iĝis pilgrimlokoj de “kremo de la kremo”, elstaraj latinistoj el la tuta mondo. Prestiĝo de ALF daŭre kreskas kaj floras. Kial ne realiĝis la esence identa ideo de Neergard? Aŭ ni havas maltro da elstaraj sciencistoj apogantaj Esperanton, aŭ maltro da esperantistoj kompetentaj pri sciencoj. Kaj ni sen ajna emocio konstatas, ke Akademio Comenius iĝis sensignifa surpapaĵo, ĉar neniu plu pretas vivteni ĝin.

Absolute la samo validas pri AIS. Jes, Helmar Frank estis entuziasmulo. Jes, li estis pompema. Sed, ĉu la ideo, krei internacian esploran kaj instruon organizaĵon kun Esperanto kiel la plej grava el la kvin laborlingvoj, estas malbona? Li kolektis aron da profesoroj, docentoj kaj aliaj universitat-nivele klerigitaj homoj, kiuj regas/konas/apogas Esperanton. Li trovis ŝtaton, kiu, nehavante propran universitaton, pretis apogi kaj subvencii AIS-on, agnoskante Esperanton kiel normalan instrulingvon kaj laborlingvon flanke de sia propra ŝtata lingvo. Li entuziasmigis esperantistojn plukleriĝi en *Esperanto*. La sistemo de sciencaj titoloj identas kun la itala/sanmarina, sed neniu nacia scienca grado validas sen esti “adapte adoptita” antaŭ la internacia komisiono de fakuloj. Neniu atingas originalan sciencon gradon sen prezenti ampleksan skriban laboraĵon kaj sen partopreni preskribitan kvanton da instruunuoj. Reago de la esperantistaro: “Frank ne kapablis agnoski AIS-on en ajna grava lando”; “Frank disdonas sciencajn titolojn”; “Kun AIS-titolo oni ne atingas ajnan materian avantaĝon”.

Agnoski Esperanton kiel samvaloran kleriglingvon en ajna universitato sukcesis neniu antaŭ Frank nek post Frank. Li provis profiti de la ekonomia situacio en orienta Eŭropo, aĉetinte kaj adaptinte kelkajn domojn en Slovakio por havi materian bazon, kaj prezentinte al la tiea ministerio pri edukado projekton de privata universitato kun Esperanto kiel unu el la laborlingvoj. La ministerio rifuzis, ĉar neniu pretis subaĉeti la ministron, kiel faris alia samloka privata neslova universitato, kiu intertempe prosperas. Tiuj faktoj estas kompreneble nepruveblaj, tial oni daŭre primokas Frank kiel sentaŭgulon.

Nun mi revenu al la prava “komitatano Z”. Neergard fiaskis, Frank fiaskis. Ĉu la esperantistoj do daŭre konstato, ke atentigi la eksteran mondon pri taŭgeco de Esperanto en la scienca klerigado estas utopio, aŭ, ĉu, damne kaj diable, finfine troviĝos iu kuraĝulo, kiu diros: jen la ĝusta vojo, kiun ni sekvu kaj subtenu???

Vera Barandovská-Frank



E@I prezentas

## Kio estas Komputeko?

*Komputeko* (mallongigo de “prikomputila terminokolekto”) estas projekto de E@I, kiu celas kunigi la prikomputilajn terminojn de diversaj vortaroj, por plifaciligi la aliron al kaj la komparon inter la diversaj vortaroj, kaj tiel stimuli ĝustan lingvouzon kaj kontraŭi la uzadon de (ofte fuŝa formo de) usonangla termino.

*Komputeko* ne celas anstataŭigi ekzistantajn iniciatojn (kiel *Komputada Leksikono* kaj *Reta Vortaro*), sed male ilin plifortigi, plifaciligante la aliron al diversaj fontoj kaj komparante elektojn kaj proponojn de diversaj vortaroj.

Ni rimarkis, ke tre ofte esperantistoj uzas anglajn terminojn, kiam ili parolas pri komputil-rilataj aferoj, simple ĉar ili ne konas, nek facile retrovas taŭgajn terminojn en Esperanto. La vortoj tamen ekzistas; vi ilin trovos en la terminokolekto — kaj eble surprize povos konstati, ke enestas pli ol 7500(!) prikomputilaj, aktualaj vortoj (kio ankaŭ pruvas, ke Esperanto jes ja taŭgas por ajna fako kaj estas plenvalora lingvo).

Pri *Komputeko* E@I kunlaboras kun la ĉefaj tradukskipoj (Openoffice.org, Firefox, Drupalo, KDE...). Maŭro La Torre de la Akademio de Esperanto detale provlegis la tutan *Komputekon*. Bertilo Wennergren estas lingva konsilanto pri malfacilaj kazoj.

La retejo [www.komputeko.net](http://www.komputeko.net) estas ĉiutage vizitata de inter 30 kaj 45 unikaj vizitantoj, kaj vizitoj kreskas. La naci-lingvaj tradukoj, kiujn ni aldonis al la retejo ankoraŭ ne estas tre fidindaj. Nur la esperantlingvaj estas momente vere prilaboritaj kaj pridiskutitaj (bonvenas helpo pri alilingvaj terminoj por la projekto).

La papera versio de *Komputeko*, kiu aperis en majo 2008 kaj estas interalie havebla en la libroservoj de FEL kaj tiu de UEA, preskaŭ elĉerpiĝis. Estas plano — kaze de bezono — represi ĝin por la UK 2009. Laŭplane en 2010 aperos nova eldono kun pluraj modifoj kaj aldonoj. Ni alvokas vin informi pri eraroj kaj pri laŭ vi mankantaj vortoj en la paĝo <http://vikio.ikso.net/Projektoj/Komputeko/SubPaĝo6>.



Temas pri provizora paĝo — ni planas krei apartan vikion tiucele sub [www.komputeko.net](http://www.komputeko.net)

E@I havas multajn planojn pri terminaroj — ne nur komputilaj. Se vin interesus kunlaboro pri tio, ne hezitu kontakti la estraron. Mankas tempo kiel ĉiam al ĉiu, sed se ni agas paŝon post paŝo, eblas multegon realigi ene de kelkaj jaroj. Ni jam rezervis la retregionon [terminaro.net](http://terminaro.net) por granda komuna loko, kie eblos estonte trovi laŭeble plej riĉan kolekton de terminoj por multaj fakoj.

Yves Nivelsteen

En la februara *Ondo* aperos prezento de la DVD-filmo *Esperanto estas...*

**Ne forgesu (re)aboni**

# ... se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla,

Kiel anoncote en la redakcia kolumno, ĉi-jare en *La Ondo* aperos tekstoj de kaj pri Zamenhof.

Ni komencas per aperigo de la Zamenhova letero, kiun oni dum pluraj jardekoj konis nur laŭ citaĵo, publikigita

de Edmond Privat en 1920 en la *Vivo de Zamenhof* (Ĉap. XII) kaj represita post naŭ jaroj de Johannes Dietterle en la *Originala Verkaro* (p. 344–345) kiel «Respondo de la 30. VI. 1914 (al invito partopreni fondon de "Hebrea Ligo")».

Oni ne sciis, ke Privat publikigis nur fragmenton, ĝis Hans Henrikson (kiu migrinte al Israelo akceptis la judan nomon Jeremi Giŝron) en 1982 trovis la tutan tekston en la Nacia kaj Universitata Biblioteko en Jerusalemo. p. 15

12  
**DRO L. ZAMENHOF**

VARSOVIO  
str. Dzika № 9.

30/VI 1914.

Kara Sinjoro!

*La ideon fondi Hebrean Esperanto-Asocion mi plene aprobas. Jam antaŭ longe oni devis tion fari, kaj mi miras, ke ĝis nun neniu provis tion fari. Neniu en la mondo tiel forte bezonas lingvon internacian kaj neŭtralan, kiel la hebreoj.*

*Por la hebreoj facila longvo neŭtrala estas necesa ne sole praktike, sed ankaŭ ideo. La espero ligi ĉiujn hebreojn de la mondo per la malfacilega lingvo antikve-hebrea estas laŭ mia opinio vana kaj tre fatala revo. Se la ideo de interunuigo de la hebreoj ligus sin kun neŭtrala, por ĉiuj facile ellernebla kaj uzebla lingvo, - ĝi farus grandegajn progresojn, ĝi farus miraklojn.*

*Mi provis iam prezenti tiun penson al la hebreoj en rusa broŝuro titolita "Hilelismo" kaj subskribita per la pseŭdonimo "Homo Sum," sed oni min tre malbone komprenis; oni diris, ke mi volas nur fari propagandon por "mia" Esperanto! Tial mi devis ĉesi...*

*Pasis multe da tempo. Popoloj kaj religioj penis uzi Esperanton por siaj celoj; sole nur la hebreoj, kiuj plej multe bezonas neŭtralan lingvon kaj pri kiuj mi plej multe pensis ĉe la kreado de Esperanto, - tenis sin flanke...*

*Nun mi tre ĝojas, ke s-ro Muĉnik kaj Vi entreprenas la kreon de Hebrea Esperanto-Asocio. Mi deziras al Vi energion kaj paciencon; se Vi tion havos, tio donos al Vi plej bonan sukceson.*

*Mi mem bedaŭrinde devas stari flanke de la afero, ĉar laŭ miaj konvinkoj mi estas "homarano" kaj mi ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ speciala religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron, kiu dividus sin nur laŭ teritorioj,*

התאחדות  
העברית  
העולמית

# la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta

Evidentiĝis, ke Privat citis el letero de Zamenhof al William Heller — bohemia judo, prezidanto de la Esperanto-Grupo *Zamenhof* en Leitmeritz en Aŭstrio-Hungario (nun Litoměřice en Ĉeĥio), sekretario de HEA (Hebrea

Esperanto-Asocio). Ĉi tiun leteron (ankaŭ la leteron de 9 jul 1914 kaj la poŝtkarton de 10 jul 1914, ambaŭ de Zamenhof al Heller) Henrikson sendis al Ludovikito, kiu aperigis ilin en PVZ-10 (*Postrikolto de ludovikaĵoj*,

1985) kaj poste en la tria volumo de la *Originalaro* (p. 344–345). Fine ĝi aperis en MEH (*Mi estas homo*, 2006) kiel dokumento №66. Sed la originalo de la letero ne estis presita en la *Aŭtografoj de Ludoviko* (1989). p. 16

sed ne laŭ gentoj kaj religioj. Estas vero ke la nacionalismo de gentoj premataj - kiel natura sindefenda reago - estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian kaj prezentas eraran rondon da malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penas stariĝi sur grundo tute neŭtrala.

Tio estas la kaŭzo, pro kiu mi malgraŭ la korŝirantaj suferoj de mia gento ne volas ligi min kun hebrea nacionalismo, sed mi volas labori nur por interhoma justeco absoluta. Mi estas profunde konvinkita, ke per tio mi alportos al mia malfeliĉa gento multe pli da bono, ol per celado nacionalisma.

Sed se mi ne volas labori por interesoj speciale gentaj, tio kompreneble ne pruvas, ke aliaj hebreoj tion ne devas fari. Tiuj hebreoj, kiuj ne volas aŭ ne povas fordoni sin ekskluzive al idealoj neŭtrale-homaj, faros bone, se ili utiligos Esperanton por sia gento. Tiel longe, kiel aliaj gentoj laboras por siaj gentaj idealoj, kompreneble ankaŭ la hebreoj (eĉ en pli alta grado) havos la rajton tion fari. Kvankam pro miaj konvinkoj mi ne povas persone partopreni en Viaj laboroj, tamen mia multe suferinta kaj suferanta gento estas por mi ĉiam tre kara, kaj ĉiufoje, kiam mi povos helpi al Vi per ia konsilo aŭ faro, mi faros tion tre volonte.

Laŭ mia opinio estas necese, ke Via Asocio havu karakteron kaj eĉ nomon speciale Cionistan; ĉar nur tio donos al Via anaro la necesan samideanecon kaj unuecon kaj ebligos al Vi bone, pace kaj sukcese labori. Se Via Asocio havus karakteron komune-hebrea, Vi havus konstante malpacon interne kaj konstantajn atakojn ekstere,

ĉar la tiel nomataj hebreoj-asimilistoj, kiuj ne volas, ke la mondo vidu en la hebreoj ion gente-apartan, konstante atakos kaj malhelpos Vin. Cetere pri tio Vi mem plej bone decidus en Via unua kunveno. En ĉiu okazo ŝajnas al mi, ke estos multe pli sendanĝere, se la unuaj paŝoj kaj la unua alvoko estos faritaj sub nomo Cionista!, por eviti tro grandan diverselementecon kaj skandalojn; nur poste, se Vi trovos tion utila, Vi povos doni al Via Asocio karakteron kaj nomon komune-hebrean.


Kunvoki en Parizo tiujn, kiuj interesas sin pri la fando de Via Asocio, laŭ mia opinio estus tre utile; fiaskon Vi ne bezonas timi, ĉar kia ajn malgranda estos Via nombro, Vi povos tamen *lib*fari ion utilan.

Ĉu mi persone povos partopreni en Via kunveno, - tion mi nun ankoraŭ ne povas diri al Vi: tio dependas de la formo kaj karaktero, kiun Via kunveno havos. Ĉar la mondo ĉiam ankoraŭ vidas en mi la ĉefon de la esperantista movado, tial mi dum la kongreso devas min teni flanke de ĉiuj partioj politikaj, religiaj aŭ socialaj. Se mi ne povos persone partopreni en la kunveno, volu transdoni al la kunveno mian koran samgentanan saluton kaj plej bonajn dezirojn por la sukceso de ĝiaj laboroj. Se Vi trovos tion utila, Vi povas antaŭlegi al la kunveno ĉi tiun mian leteron.

Via



## Mi estas homo



Originalaj verkoj de  
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio Scio. Volumo 6

La prezidanto de la Esperanto-Ligo en Israelo, Josef Ŝemer, kies dankindan kunlaboron mi ĝuis en 2006, pretigante tradukon de la letero de Zamenhof al la Biluanoj de 18 nov 1883 (MEH, №3), retrovis la leterojn al Heller en la kolekto de aŭtografaj *Shvadron* en la Nacia kaj Universitata Biblioteko (Jerusalemo).

Josef sendis fotokopiojn de la leteroj al ni kaj proponis, ke ni faksimile aperigu en *La Ondo* unu el la leteroj, kaj la alia aperu en *Israela Esperantisto*. Ni elektis la unuan leteron (MEH, №66), kaj nun ĉiuj povas vidi, kion Ludoviko Zamenhof tajpis al la iniciatoro de HEA (kies kunveno en Parizo ne okazis pro la komenciĝinta mondmilito).

Zamenhofologoj povas kompari la editoradon de Privat kaj Ludovikito kaj vidi, ekzemple, ellasojn kaj miscitojn de

Privat. Harfendemulojn eble interesos eĉ la maniero de la emfazado de la vortoj, kiujn Zamenhof substrekis.

Pli gravas, ke en ĉies dispono nun estas la aŭtenta dokumento, kiu atestas la evoluon de la Zamenhofaj ideoj pri naciaj problemoj. En la studenta aĝo li estis, laŭ liaj propraj vortoj, "granda politika cionisto" (MEH, p. 250), aktivulo de la 'palestinofila' movado Ĥibat Cion kaj prezidanto de la plenumkomitato de Ĥovevej Cion en Varsovio. Sed en sia plej ampleksa studo *Hilelismo* (1901) li fortege kritikis cionismon kaj fine dediĉis sin al homaranismo, kiun li donacis al la mondo en 1906 kaj kiun li evoluigis ĝis siaj lastaj tagoj... Homarano ne povis aprobi naciismon, eĉ tiun de sia propra gento.

Aleksander Korĵenkov



## Poemoj de Pjotr Vjazemskij

**Pjotr Andréjeviĉ Vjazemskij** naskiĝis 12 (23) jul 1792 en familio de riĉa rusa princo edziniginta irlandaninon. Ricevinte brillan hejman edukon li daŭrigis siajn studojn en Peterburgo kaj en Moskvo, sed en 1807 post la forpaso de la patro, li reiris hejmen, kie lin prizorgis lia bofrato, verkisto kaj historiisto Nikoláj Karamzín, kies hejmon frekventis plej famaj tiuepokaj beletristoj.

En la frua junaĝo Vjazemskij ekverkis, stimulite de la agrabla vivo, frua edziĝo (en 1811) kaj la milito kontraŭ Napoleono. Li verkis epikurecajn poemojn, elegiojn, epigramojn, fablojn. Postmilito, sub la influo de liberalaj ideoj, li projektis konstitucion kaj liberigon de servutuloj, kio kaŭzis konflikton kun lia diplomata ofico. En la 1820aj jaroj li verkis plurajn romantismajn elegiojn kaj engaĝitajn poemojn inkluzive de *La Rusa Dio*. Lian popularecon atestas, ekzemple, tio, ke la unuan ĉapitron de *Eŭgeno Onegin* de lia amiko Puŝkin, komencas epigrafo el *La unua neĝo* de Vjazemskij.

Post kelkaj jaroj ekster la ŝtata servo, en 1830 li ekservis en la financa ministerio, kaj fine de sia kariero li estis vicministro pli klerigo kaj ĉefcenzuristo en Ruslando, senatano, membro de la Ŝtata Konsilio.

En la matura aĝo, precipe post la morto de Puŝkin (1837), Vjazemskij estis konservativulo, kaj tio respuguliĝis en liaj lirikaj (ekzemple, *La Sankta Rusujo*) kaj literaturologiaj verkoj. Demisiinte en 1858, li forveturis al Germanio kaj mortis en 1878 en Baden-Baden. Ni proponas kelkajn liajn fruajn poemetojn.



**AIKO**

### AL LA PORTETO DE BOMBASTA POETO

*Bibris' per lingvo dia kantis, sen diskut':  
Neniu el homar' komprenus lin en tut'.*

1810

### EPITAFIO

*Rusia Diogen' jen kuŝas ĉi-parcele:  
Tiu ja vivis en barel', la nia — kunbarele.*

1811

### DU HUNDOJ

*"En ĉambro dormas vi, mi frostas sur peron',  
Pro kio?" — grasan mopson skoldis hundo vila.  
Respondis tiu: "pleje simplas la rezon':  
Prenitas vi por serv', mi — por amuz' facila".*

1819

### BATITA HUNDO

*Hund' bojis al ŝtelist', punitas ĝi pro ĝeno  
al dormo de sinjoro; je alia foj'  
Dormadis hund', kaj priŝtelitas domo: je mateno  
Punita estis hundo — ĉar ne estis boj'.*

1819

### HOMO KAJ PAPILIO

*Mokadis hom' pri eta papili'.  
"Matena gast'! Vi povras, senkonsola! —  
Momentas via vivo! — diras li. —  
Kaj via tombo jen — arbust' viola".  
Viciĝas multaj jaroj laŭ rutin'  
Cent jarojn havas la oldul' en fin'.  
Mortante jam sur lito de turmento,  
Li diris kun suspir': "La viv' estas momento!"*

1819

*Aspekton de Femido kial, artemuloj,  
Kun glavo kaj pesil' imagas vi en glor'?  
Per glavo ŝi senkulpajn buĉas sen skrupuloj,  
Kaj per pesil' ekscias pri korupt-valor'.*

1810aj jaroj

### LANGO KAJ DENTOJ (orienta apologo)

*Sultan' veziron skoldis foje pro la mank',  
Ke li ne estis firma laŭ la karaktero.  
"Pro tiu manko — al la sorto estu dank'!  
Ĝi min retenis en la gloro kaj prospero, —  
Respondis la veziro, — tiu ĉi malfirm'  
Dum la kortegaj ŝanĝoj estis mia ŝirm'.  
Mi sesdekjaras nun, — aldonis li, frivola, —  
El firmaj dentoj, kiujn al mi donis la natur',  
Ne multaj — vidu — restis nur;  
Transvivis ilin ĉiujn mia lango mola."*

1823

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**





# El “Mia jarcento”

de Günter Grass

En 1999 aperis *Mia jarcento* de Günter Grass — cent mallongaj rakontoj, mozaikeroj de la dudeka jarcento. El malsamaj perspektivoj aperas malsamaj personoj: simpatiaj kaj malsimpatiaj, krimuloj kaj viktimoj, viroj kaj virinoj. Tiuj rakontetoj ligiĝas intime kun la germana historio, kaj finfine el la bunta ĥaoso aperas plena bildo de la dudeka jarcento. Jam sep ĉapitroj el *Mia jarcento* aperis en *La Ondo de Esperanto*, ĉiuj elektitaj kaj tradukitaj de Wolfgang Kirschstein. Nun ni proponas la okan, verkitan antaŭ 75 jaroj.

## 1934

Inter ni dirite: oni devintus reguligi tiun aferon pli akurate. Estis mi tro kondukita de personaj kialoj. La embaraso komenciĝis post la tro hasta translokiĝo pro la puĉo de Röhm<sup>1</sup>. De Dachau alkomanditaj, ni transprenis la 5an de julio KZ<sup>2</sup> Oranienburg, mallonge post la anstataŭigo de komplete fuŝula SA-anaro per protektoskipo<sup>3</sup>, cetere de kamaradoj, kiuj antaŭnelonge en Wiessee kaj aliloke senceremonie pritraktis la Röhm-klikon. Ankoraŭ videble elĉerpitaj, ili transdonis al ni la tutan butikon inkluzive de kelkaj SA-subgvidantoj, kies devo estis helpi ĉe la burokrata parto de la transpreno, sed ili montriĝis komplete sentaŭgaj.

Unu el tiuj batemuloj — kun la karakteriza nomo Ŝtalkingo — ordonis veni al apelo la kaptitojn konfiditajn al ni kaj igis la judojn inter ili stari aparte.

Apenaŭ dekduo da figuroj, el kiuj unu aparte kaptis atenton. Ĉiukaze mi tuj rekonis Mühsam<sup>4</sup>. Nedubbla, tiu muzelo. Kvankam en la pundomo de Brandenburg oni jam forsabris la barbon de tiu eksa sovtribelaĉulo kaj cetere ankaŭ sufiĉe sisteme pritraktis lin, tamen restis sufiĉe da li. Inter ni dirite, anarkiisto de la subtila speco kaj krome tipa kafejliteraturanto, kiu dum miaj fruaj jaroj en München prezentis ĝenerale komikan vidaĵon kiel poeto kaj agitanto por absoluta libereco, jes ja, kaj speciale por libera amoro. Nun staris tiu mizeruleto antaŭ mi, apenaŭ alparolebla, ĉar surdigita. Por klarigi li montris al siaj oreloj, kiuj estis parte pusaj, parte krustintaj, kaj ridetis senkulpiĝe.

Kiel adjutanto de brigadestro Eicke<sup>5</sup>, mi raportis al li kaj deklaris, ke Mühsam

estas unuflanke sendanĝera kaj aliflanke speciale danĝera, ĉar eĉ la komunistoj timis lian parolfluan. “En Moskvo ili jam estus ekzekutintaj lin”.

Brigadestro Eicke diris, ke mi zorgu pri tiu afero kaj rekomendis specialan pritrakton, kio ja estis sufiĉe komprenebla. Finfine estis Theodor Eicke, kiu persone likvidis Röhm. Sed tuj post la apelo mi faris mian unuan eraron, ĉar mi opiniis, ke mi povis transdoni la filaboron al tiu SA-idioto, Ŝtalkingo.

Inter ni dirite, mi malinklinis pli ol necese ekrlati kun tiu judo. Krome li demonstris dum la pridemandado mirindan sintenon. Al ĉiu demando li respondis per versoj el poemoj, evidente siaj propraj, sed ankaŭ de Schiller: “kaj se vi ne riskos la vivon...”<sup>6</sup>. Spite al manko de kelkaj antaŭdentoj, li recitis scenejtaŭge. Tiu estis unuflanke komika, sed aliflanke... Krome ĝenis min la nazumo sur lia juda nazo... Des pli la rompoj en ambaŭ ties vitroj... Kaj neŝancelebla li ridetis post ĉiu citaĵo...

Ĉiukaze mi lasis al Mühsam kvardek ok horojn kaj donis al li la urĝan konsilon mem fini dum tiu tempolimo. Estintus la plej pura solvo.

Nu, li ne faris tiun komplezon al mi. Do Ŝtalkingo ekagis. Evidente, li dronigis lin en iu klozeto. Mi ne volis scii detalojn. Montriĝis, post detala esploro, ke estis komplete fuŝaĵo. Kompreneble, poste estis malfacile ŝajnigi suicidon. La manoj en nenatura spasmio. Ni ne sukcesis eligi lian langon. Krome la nodo estis plektita tro sperte. Mühsam neniam kapablus tion. Kaj tiam Ŝtalkingo faris plian merdaĵon, ĉar li dum la matena apelo komandis: “Judoj antaŭenpaŝu por fortranĉo!”, kaj tiel li publike diskonigis la tutan aferon. Tiuj sinjoroj,

inter ili du kuracistoj, kompreneble tuj konstatis la fuŝaĵon.

Brigadestro Eicke senplue riproĉis min: “Aŭskultu Ehardt, tion vi, je Dio, devintus solvi pli glate”.

Ne eblis ne konsenti al tio, ĉar, inter ni dirite, tiu afero dum longa tempo postsekvos nin, ĉar ni ne sukcesis silentigi tiun surdan judon... En la eksterlando oni celebris Mühsam kiel martiron... Eĉ la komunistoj... Kaj ni devis fermi la KZ Oranienburg kaj distribui la kaptitojn al aliaj kampejoj. Nun mi denove estas en Dachau, probable por provo.

Tradukis el la germana  
**Wolfgang Kirschstein**

## Notoj

1. **Röhm, Ernst** (1887–1934) estis gvidanto de la nazia SA (sturmtaĉmento). Laŭ Hitler, Röhm intencis puĉi kontraŭ lin, tial Röhm kaj aliaj eblaj konspirantoj kontraŭ la nazian diktaturon estis murditaj dum la “nokto de longaj tranĉiloj”. Röhm estis arestita en Bad Wiessee (suda Bavario) kaj mortpafita la 1an de julio 1934.

2. **KZ** estas mallongigo de la germana vorto “Konzentrationslager” (koncentrejo).

3. **Protektoskipo** (Leibstandarte-SS Adolf Hitler). Elita trupo por protekti gravulojn, parto de SS.

4. **Mühsam, Erich** (1878–1934). Verkisto kaj anarkiisto, aktivulo de la bavaria soveta reĝimo de 1919. La nazioj murdis lin la 10an de julio 1934 en KZ Oranienburg.

5. **Eicke, Theodor** (1892–1943). Brigadestro (Brigadenführer-SS), kiu organizis la teroron komence en KZ Dachau (suda Germanio). Unu el la ĉefekzekutistoj dum la “nokto de longaj tranĉiloj” (li mortpafis Röhm). En junio 1934 Eicke transprenis KZ Oranienburg (norde de Berlin) kaj organizis en julio la malfondon de tiu koncentrejo.

6. “**kaj se vi ne riskos la vivon...**” Poste sekvas: “vi neniam gajnos la vivon” fine de la *Rajdista Kanto* de Schiller.



## La Roma Triptiko

**Johano Paŭlo la Dua. *La Roma Triptiko* / Trad. el la pola Lidia Ligeza. — Krakovo: Hejme, 2006. — 32 p., il.; 1000 ekz.**

*Triptiko* ĉar tri poemoj, *Roma* ĉar verkita inter la unikaĵoj de Romo. Johano Paŭlo la Dua komunikis sian animon per poezio dum kvardek jaroj, kvankam foje pseŭdonime. Jam aliaj papoj (el kies serio li estis la 267a) sin engaĝis en beletraj kampoj, sed apenaŭ papiĝinte ili forlasis la “hobion”, absorbitaj de la nova tasko.

Johano Paŭlo la Dua, male kaj bonŝance, insistis kaj en 1988 presrajtigis la *Roman Triptikon*, kiun nun tridek sponsoroj presigis en la Esperanta traduko de Lidia Ligeza. Temas pri tri poeziaj komponaĵoj vere originalaj, ĉar ili estigas, interalie, valoran diskuton, kaj vekas problemon, kaj helpas ĝin pozitive solvi. Tiu ĉi *Roma Triptiko* ne nur elmontras poezion plenan je alpa naturo, itala arto kaj biblia saĝeco, sed ankaŭ — kaj precipe — poezian mergiĝon en konceptojn filozofiajn kaj teologiajn kaj ĉerandajn similaĵojn.

Kiel oni vidas, ni provas randi la disputon: ĉu eblas poezio (“liriko”, laŭ tiufakaj traktantoj) tra konceptoj abstraktaj? Aŭ, pli klare: ĉu eblas senti kaj sentigi filozofion kaj teologion poezio? Mi havas ankaŭ la italgitan RT (*Trittico Romano*), tial spontanane pensis al la itala idealisma filozofo Benedetto Croce (Kroĉe, 1866–1952) kiu sisteme iniciatis kaj semis tra Eŭropo jenan doktrinon: poezio emocias koron kaj fantazion pro tio, ke ĝi agas per imagoj-bildoj, kaj tiuj ĉi siavice apogiĝas, kaj trafas la sensojn nur pro tio ke ili estas unuopaj kaj individuaj; universalaj kaj absolutaj kaj abstraktaj konceptoj ne kapablas fariĝi imagoj-bildoj ... Do, deduktu ni, ankaŭ tiu *Roma Triptiko* ne estus poezia! Se la teorio plaĉis al Paŭlo Valery, ĝin rifuzis la kontraŭa pensfluo, kies epigono estas Thomas S. Eliot, poeto-pensulo, laŭ kiu kiu ajn realideo tra la faŭko de poeto burĝonas en “vizion”, do, en imago-bildon laboriganta la profundecojn de la homaj poezisensiloj kaj poeziperceptiloj.

Puŝite de tiu opinio, oni povus serĉi en la malmultaj paĝoj de RT, kiom da fojoj la filozofiaj kaj teologiaj konceptoj tuj glite disvolviĝas en vido, bildo kaj vizio...

Kio, do, estas la “vizio” de la poeto en RT? Fronte al natura fenomeno aŭ



Johano Paŭlo la Dua  
Papo kaj Poeto

okazaĵo, en la animo de la poeto ektrakuras eventoj bibliaj kaj konceptoj filozofiaj kaj teologiaj. En la versoj ne elstaras rimo aŭ aliaj helpiloj foje plipoezigantaj la tekston (en la esperanta versio, apenaŭ videblaj tiaĵoj). Kaj tamen ne temas pri poezio gnomika (= aforisma, maksima) kaj saĝafekta aŭ moralisma. Kaj la “vizio” de la poeto iĝas via poezipercepta “vizio”! Ekzemple: en la unua ero en la Triptiko, la kontemplanto vidas alkuri fronte al si arbaran lavangon kaj multeformajn aĵojn. La poeto miras pro iliaj forto, belo, evoluo kaj forpasado. Ja, la homo miras, eĉ kaptiĝas en la miro, male la aĵoj ne kapablas miri pri si aŭ pri alies eventoj. La homo sin demandas pri la origino de la “Torento” kaj de si mem, kaj, kvankam per peno kaj sufero (“vi devas iri supren, kontraŭ la fluan”), retroiras la kurson de ĉio ĝis ties fonto, nome la Verbo, la kreanta Vorto. La karakteriza miremo, ne admiremo, de la homo-poeto faras la abstraktajn konceptojn miro pri la biblia dia proklamo “kaj Li vidis ke tiu estas tre bela”. Kiel ne memori ĉe tio, ke jam Platono kaj Aristotelo skribis, ke la poezio naskiĝas el la mira surpriziĝo, kaj ke la belo kaj bono (καλοκαγαθία) generas unu la alian?

Duafoje “metafizikaj” konceptoj nutras fantazion kaj fariĝas sensaj signifoj en dua ero de la *Roma Triptiko*. Malfacilas imagi poeton kiu skribas por emociigi: vera poeto informas pri siaj emocioj kaj nova legado pri la monda realo. Karol Wojtyła haltas antaŭ la pordo de la Siksta Kapelo en Vatikano. Li scias, ke ene el muroj brilas la famaj pentraĵoj-bildoj eltiritaj el la biblia Genezo. La Genezaj vortoj jam atendis sian Mikelanĝelon por fariĝi bildoj, sed jam antaŭe la nenio — la nenio metafizika, ne nur fizika — atendis fariĝi

bildo per la Vorto: la Vorto kiu ekzistigis la aĵojn kaj vidis, ke “ĉio estas bona”, kaj fine fariĝis mem karna bildo per la Enkarniĝo. Nun tiu Vorto-Bildo, en la pentraĵoj kaj en la realo, duopigas en “vizioj” pri la Komenco kaj Fino, pri la Juĝo kaj Savo. Aparte ĉi tie la atenta leganto konstatas, ke vere Wojtyła fulme kunigas, kvankam laŭ diversa mezuro, la tri spiritajn fortojn, per kiuj la homo de ĉiam serĉis la veron, nome: arto, filozofio kaj religia kredo.

Kaj sojle de la Siksta Kapelo la poeto ne povas ne elvoki al la memortion, kio en tiu loko okazis al li mem kaj kio okazos en la estonteco: Tie falis sur lin la tasko de la papeco kaj la samo okazos al venontaj elektitoj.

Simile elstariĝas la lasta de la trio. Abrahamo, la migranto, la obstina kredanto, kiu, diavorte altirita, kredas ke li mem estos patro de sennombra popolo malgraŭ ke el li filo daŭras ne alveni, kaj kiu por oferi la unikan fine el li naskiĝintan filon, supreniras la monton Moriĵa: ĉio tio fulme konsciigas la poeton ke, se la Abrahamo patra amo devas havi limojn, tiajn limojn ne havos Alia, kiu donos sian filon al la homoj kiuj elprovas ties amon. La tuto kunfluas milde sed firme en la biblian koncepton: “Dio ja ekamis la mondon tiel, ke filon sian Li donis”. Ĉu atingo mistika? Ĉu mistika poezio? Eble ne. Temas, certe, pri poezio religia, kiu el la biblia rakonto nedisdegninta nutriĝi ankaŭ je mitaĵoj, rapide elnestigas kaj poezie komunikas la esencon intencitan.

Kion diri pri la esperantigo de RT? Mi havas la italan tradukon el la pola. La esperanta ŝajnas paŭsaĵo de la itala: pri la litera fideleco, do, neniu dubo; pri la poezia transdono mi ĝin gustis, kaj gustigis al kunlegantoj, en la esperanta versio. Cetere la verkaro de Lidia Ligeza, originala kaj traduka vaste aprecata verkistino, antaŭforigas neplenestimajn hezitojn. Tamen unu stumbleto aperas tie, kie diratas, ke la imagitaj, sed realon donantaj, pragepatroj, postpeke, ĝene konsciiĝis pri propra nudeco, dum antaŭe en la reciproka sindonado “ili ne kantis, dum daŭris tiu dono”. Ĉu *kantis* por *hantis*, aŭ eble *hontis* — kiel en la itala? Se tiel, okazus tiom amuza preseraro, ke ĝi aperas kiel altira nevuso en bela vizaĝo.

Kiu emas kontroli la verdirecon de tiu recenza noto, certe konstatos, ke ĝi ne sukcesas briliĝi la poezian riĉecon de la *Roma Triptiko*.

**Armando Zecchin**

## Grava eĉ post la morto de la Civito

Lins, Ulrich. *Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA*. — Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2008. — 126 p., il.

En la periodo tuj post la t.n. Hamburga Puĉo (1974–1976) Ivo Lapenna plurfoje parolis al mi pri du eldon-projektoj kiujn li ŝatus realigi: la prezenton de la UEA-historio tra la protokoloj de la estraraj kunsidoj kaj *Mia Fin-Kalkulo kun Ili*, verko diktita de liaj rankoroj post la UK 1974. Bedaŭrinde, malgraŭ miaj insistoj, ili ne efektiviĝis. Kiam, en la konferenco de NEM (Parizo 1976) niaj vojoj disiĝis, li restis sub la influo de mediokraj figuroj kaj, paŝon post paŝo, plenumis sian “intelektan suicidon” kiel en 1988 mi skribis en nekrologo.<sup>1</sup>

La cent-jara ekzisto de UEA kaŭzis la aperon de du monografioj pri temaj: la disertacion de Marcus Sikosek<sup>2</sup> kaj la nun recenzatan libreton de Ulrich Lins.

Lins koncedas enkonduke (p. 7), ke “Plena analizo de la historio de UEA restas tasko farota” (kio signifas lian implicitan distancigon de la epizodeska verko de Sikosek), sed ke li volas “kompreneble stimuli al pliaj esploroj” (p. 7).

Efektive, la ĉapitroj *Tra la unua jarcento de UEA* (p. 9–52) kaj *La heredaĵo de Hector Hodler* (p. 53–74) aperis jam pli frue (2008, resp. 1988/89 en la UEA-revuo), sekve apenaŭ prezentas ion novan. La fina parto de la verko estas simpla listo de la prezidantoj, direktoroj kaj redaktoroj de UEA (kial mankas la ĝeneralaj sekretarioj?) eĉ malpli elvokiva ol la listo de la Avinjonaj papoj...

La plej interesaj ĉapitroj restas tiu pri la fondinto de UEA, Hector Hodler (1887–1920), kaj tiu pri Ivo Lapenna (1909–1987).


La vivo de Hodler tro kurtis por lasi rimarkindajn spurojn. Lia idea mondo apenaŭ konatas al la nun-tempaj membroj de UEA. Bedaŭrinde, neniu entreprenis (se escepti la ekprovon de Chmielik<sup>3</sup>) kunigi liajn artikolojn kaj verketojn en unu facile konsultebla volumo kun la necesaj komentoj por nun-tempuloj.

La konkludo de Lins frapas kaj tranĉas: “... en la organiza strukturo de SAT konserviĝis eĉ pli de la originalaj impulsoj de Hodler, ol en la neŭtrala movado” (p. 72). Post la morto de sia fondinto UEA diluis ties penson far “politike neinteresitaj aŭ ideo neŭtral-emaj personoj” (p. 72). Sur la sojlo de sia dua jar-cento UEA farus bone, se ĝi ne

nur parolus *pri* Hodler, sed reaŭdigus lin mem en ties verkaro...

Koncerne la “eseon” (certe ne temas pri literatura ĝenro, sed simple pri skizo pri lia (ĉefe) esperantista agado) pri Lapenna, Lins ĝin dividas en tri “aktojn” kaj epilogon. Ĉi aktoj ampleksas jenajn fazojn en la vivo de Lapenna:

1. ĝis la frua postmilita tempo;
2. 1951 (establiĝo en Britujo) ĝis la kriziĝo en UEA;
3. la eventoj ĉirkaŭ la t.n. Hamburga Puĉo kaj lia agado en NEM (1974–1987).



La Epilogo estas nenio alia ol ŝanceliĝo kiel ĝuste kaj juste apreci la personecon de Lapenna (“Lapenna lasis la diskuton pri justa pesado de liaj meritoj kaj mankoj nefermita”, p. 112). Sed ĉi diskuton lasis nefermita ne Lapenna, sed liaj “pesantoj”. Ke en ĉi ĉapitro Lins citas el nekrologo de Régulo<sup>4</sup> eble indikas, ke ĉi juĝo de la hispano plej proksimas al lia propra.

Tamen, por povi pesi necesas meti sur la pesil-tason la tutan pezon de Lapenna. Kaj tion povus fari nur vera biografio kiu kunigus ne nur ĉiujn faktojn, sed prezentus la facetojn ĉi-kadre necese neglektitajn de Lins: la homo, la amiko, la edzo (triobla; kia *tertium comparationis* en la tri edzinoj?), la universitata instruisto kaj sciencisto. Nenio pri tio, ĉu en lia profesia vivo konfirmeblas la trajtoj skizitaj en lia esperantista kariero. Kiel lin taksis superuloj, kolegoj kaj studentoj? Se lia esperantisteco pleje konatas al (ankoraŭ kelkaj) esperantistoj, kio do pri lia pan-akira laboro kiu certe ne okupis minoran parton de lia tempo?

Ankaŭ lia jugoslavia tempo bezonas plian heligon (gepatra domo, gimnazio, universitato, profesiaj jaroj, milita tempo). Lins diras (p. 76), ke “verŝajne” Lapenna ne estis membro de la Komunista Partio. Ĉu tio jam ne eltroveblas? Kiam Borsboom verkis pri Andreo Cseh, li preteratentis konsulti la diocezan arkivojn de la hejma diocezo de Cseh. Kio pri la arkiva situacio en Zagreb kaj ali-loke en Kroatujo? Kion postlasis militoj?

Lapenna skribis milojn kaj milojn da leteroj kies sistema ekspluato kaj analizo donus plian bazon por la “justa pesado” postulita de Lins. Se UEA post 1974 kredis la “kazon Lapenna” finita, ĝi eraris. Lia granda kaj gravo ne ŝrumpas, se iuj kredas detekti ĉe li homajn aŭ psikajn mankojn (neniu vivas sen ili), eĉ se tion faris lia eksedzino Emilija (p. 97). Lapenna povis esti milda kiel ŝafo, sed ankaŭ feroce kiel tigro...

Ŝajnas, ke la libron oni iom last-minute petis de la aŭtoro (kvankam la 100-jariĝon oni povintus previdi delonge). Eble eĉ pro tio enŝteliĝis kelkaj misoj: p. 56: mankas la pied-noto 7; p. 84, pied-noto 68: anstataŭ Assen estu Asen (tamen ne Azen); p. 93: en la Vermaas-citaĵo io elfalis. Ne klaras, kial en la Bibliografio (p. 123–126) ja rolas la aŭtobiografio de Hans Jakob, sed *Hamburgo* de Lapenna kaŝiĝas en la pied-noto 125. La titolo de la verko misimpresas propagandece kaj eble ne venis de Lins...

La ĉefa merito de la nuna verko de Lins konsistas en tio, ke li donas bavigan antaŭguston, kiel povus aspekti estonta detala historio de UEA (kiu restos grava eĉ post la morto de la Civito) kaj biografio kiu prezentus al ni la “tutan Lapenna”. Li havos do duoblan taskon por la postemerita tempo...

**Reinhard Haupenthal**

### Referencoj

1. Haupenthal R. *Science analizi la “Fenomenon Lapenna”*: Pensoj okaze de la morto de Ivo Lapenna (1909–1987) // *Sen-naciulo*, 1988, №2, p. 23; la sama: “Intellektueller Selbstmord” // *GEJ-Gazeto*, 1988, №2, p. 35.
2. Sikosek M. *Die neutrale Sprache: Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes*. — Bydgoszcz: Skonpres, 2006. — 459 p.
3. Hodler H. *Novaj vojoj (La pacproblemo)* / Red. Tomasz Chmielik. — Svidniko: Fondumo “Edmond & Yvonne Privat”, 1999. — 88 fol.
4. Régulo J. *Gloso pri Ivo Lapenna (1909–1987)* // *Boletín*, 1988, №285, p. 4–5.

## Kortuŝa majstroverko

Heller, Wendy. *Lidia: La vivo de Lidia Zamenhof, filino de Esperanto / Tradukis el la angla Bernhard Westerhoff.* — Antverpeno: Flanda Esperanto-Ligo, 2007. — 389 p., il.

Kiam Wendy Heller, kalifornia bahaanino kun rusaj kaj jud-germanaj radikoj, en 1976 ekhavis la ideon verki pri Lidia Zamenhof, la plej juna filino de L.L. Zamenhof, ŝi sciis tre malmulte pri tiu rara virino kaj preskaŭ nenion pri Esperanto, eĉ ne havante konojn en tiu lingvo kreita de ŝia patro.

En 1985 aperis ŝia plurcentpaĝa libro pri la vivo kaj agado de Lidia Zamenhof en la angla lingvo. Intertempe ĝi estas elĉerpita kaj nur malfacile havebla brokante. Nun, dank' al la klopodoj de la tradukinto Bernhard Westerhoff, la grava kaj nepre leginda studo ekzistas en Esperanto.

Nur en 1980 Heller komencis sian esploradon, kiu kondukis ŝin al diversaj personoj en pluraj landoj, kiuj konis la zamenhofan filinon aŭ konservis ŝiajn leterojn. La plej fruktodona kontakto estis trovita kun sinjorino Roan Orloff Stone. Sed ankaŭ multaj esperantistoj helpis al ŝi trovi la dokumentojn. La tasko verki pri Lidia Zamenhof necesigis la ellernadon de Esperanto, kaj Heller surpriziĝis kiom rapide ŝi lernis tiun mirindan lingvon pli flue ol kelkaj lingvoj, kiujn ŝi studadis antaŭe dum jaroj.


En sia infanaĝo Lidia Zamenhof ne interesiĝis pri Esperanto kaj eĉ mokis pri ĝi. Ĉar ŝiaj gepatroj ne volis lasi ŝin sola en Varsovio, kiam ili veturis al la berna Universala Kongreso de Esperanto en 1913, ili kvazaŭ devigis ŝin lerni Esperanton. Tion ŝi sukcese faris en kelkaj semajnoj por kompreni la paroladojn de la kongreso. Tie ŝi aŭdis ankaŭ pri la bahaaj kredo kaj movado kiam ŝia patro donis intervjuon al ĵurnalisto de brita religia periodaĵo.

La biografio de Lidia Zamenhof (naskita en 1904) estas rimarkinda kaj nekutima en pluraj rilatoj.

En la aĝo de dek tri jaroj ŝi perdis sian patron, en la aĝo de dudek — sian patrinon. En kontrasto kun la plimulto de la Zamenhof-familianoj ŝi elektis ne medicinon, sed juran studadon, sed fakte ne interesiĝis pri tiu ĉi profesio. Anstataŭe ŝi decidis dediĉi sin plene al la Esperanto-movado, al la pacifismo kaj la problemoj de la virinoj. Varbita de Martha Root por la bahaaj kredo,

ekde la mezo de la dudekaj jaroj ŝi engaĝiĝis kun ĉiuj siaj fortoj por la disvastigo de la idealoj de la bahaaj movado. Iuj kredis, ke la bahaaj kredo signifas pli altan nivelon de la homarismo, kiun Zamenhof inventis. Ŝia sindediĉo al la bahaaj movado tamen ne trovis aprobon ĉe la Zamenhof-familio, sed kiel liberalaj judoj oni lasis ŝin fari. Krom tio ŝi estis pli malpli sola, kiu propagandis la bahaan kredon en Pollando.

En 1930 Lidia pilgrimis al Hajfo al la ĉefsidejo de la bahaaj komunumo por engliti la influon de Ŝogi Efendi, la "Gardanto de la Kredo"<sup>1</sup>.



Ĝis la eksplodo de la dua mondmilito Lidia entuziasme instruadis Esperanton laŭ la Cseh-metodo en diversaj landoj, ĉefe Francio kaj Svedio. Invitita de esperantistoj kaj bahaanoj, en septembro 1937 ŝi vojaĝis al Usono, kie en diversaj urboj ŝi instruadis Esperanton.

Kiel personeco Lidia estis korpe iom malforta, ĉar nur 1,5 metrojn alta, sed despli verva ŝi estis kiel instruistino. La plimulto de la kursanoj tre ŝatis ŝin, sed samtempe oni konsideris ŝin iom stranga, fermata kaj distanciĝema (precipe kiam ŝi ne laboris, estante laca).

La mikso inter la judino el Pollando, la esperantistino kaj la bahaanino devis vekti suspekton, precipe ĉe la perpleksaj kaj sensaciavidaj ĵurnalistoj, kiuj

kutime skribis stultaĵojn pri ŝi kaj Esperanto. Kiel simpatianto de la bahaaj kredo ŝi ne ĉiam trafis al akcepto en esperantistaj medioj (kaj inverse). Okazis eĉ malfeliĉaj konfliktoj kaj miskomprenoj inter diversaj aktivuloj, organizantoj kaj gastigantoj, kiujn Heller impresis pri skribas. Do Lidia konsideris sian mision en Usono malfacila, eĉ parte malsukcesa, eble ankaŭ ĉar la usona pensmaniero diferenciĝis de tiu en Eŭropo. La usonanoj ne lasis sin amase mobilizi por Esperanto-kursoj, konstato, kiun jam Zamenhof faris en 1910, kiam li vizitis Usonon okaze de la Universala Kongreso en Vaŝingtono. Malgraŭ tio al Lidia estis sugestite flanke de la usonaj esperantistoj, ke ŝi restu en Usono aŭ eĉ provu ricevi la usonan civitanecan.

Ĉar la furora antisemitismo en Eŭropo ĝuste fine de 1938, kiam eksplodis la fifamaj kontraŭjudaj pogromoj (Reichskristallnacht) fortimigis ŝin reveni al Pollando. Bedaŭrinde la usonaj enmigraj aŭtoritatoj rifuzis ŝian peton pri longigo de la vizo. Senluziigita Lidia do forlasis Usonon fine de novembro 1938 por esti en Pollando la 10an de decembro. Tie ŝi vizitis urbojn en la orienta parto por propagandi la bahaan kredon. Post la eksplodo de la milito Lidia klopodis ricevi vizon por Francio aŭ Nederlando, kie esperantistoj pretis ŝin inviti por instrui Esperanton. Vizojn ŝi bedaŭrinde ne ricevis. Ĉar ŝi ne povis forlasi Pollandon, ŝi ankaŭ ne veturis al Svislando, kie en 1939 okazis la 31a Universala Kongreso de Esperanto. Ankaŭ ŝia provo pilgrimi denove al Palestino fiaskis. La bahaaj Gvidanto Ŝogi Efendi respondis al ŝi en printempo 1939, ke pro la tikla situacio en lia lando ŝi prefere prokrastu sian pilgrimon kaj helpu disvastigi la bahaan kredon en Pollando.

La 25an de septembro 1939 la Zamenhofa domo ĉe strato Królewska 41 estis trafita de bombo, kaj la Zamenhofoj devis serĉi alian tegmenton. Adamo, Wanda kaj Sofio, kiuj laboris en la juda hospitalo, estis arestitaj de Gestapo kaj portitaj en la malliberejojn de Varsovio. Komence de marto ili denove estis liberigitaj, sen proceso. Adamo ne revenis, ĉar supozeble li estis mortpafita en arbaro ĉe Palmiry proksime de Varsovio. La esperantistoj kaj bahaanoj de Usono klopodis organizi la vojaĝon de Lidia, sed estis jam tro malfrue. Fakte ĉiuj internaciaj klopodoj forportis Lidian al sekura loko restis vanaj.

<sup>1</sup> Ŝogi Efendi estis la plej maljuna nepo de Abdu'l Baha, kiu fondis la bahaismon.

En la varsovia geto Lidia instruis la anglan por vivteni sin. La 22an de julio 1942 komenciĝis la likvido de la varsovia geto kaj la deportado de judoj al Treblinko. Pri la sorto de Lidia longe nenio estis certa, kaj onidiroj cirkuladis. Dum Wanda Zamenhof, la edzino de la filo de Zamenhof, kun sia filo — kaj Zamenhof-nepo — Ludwik (nun Louis Christophe Zaleski-Zamenhof) sukcesis fuĝi el la transŝarĝa selektejo, oni kredis ke ankaŭ Lidia povis savi sin kaj ke ŝi troviĝas ie en Ruslando.

Sed fakte nur en 1993 oni ekhavis certecon pri la sorto de Lidia, kiam atestantino kun la nomo Eva Toren, vivanta en Tel-Avivo, rakontis en artikolo de Josef Ŝemer publikigita en *Israëla Esperantisto*, ke ŝi konatiĝis kun Lidia Zamenhof en aprilo 1942 okaze de paska festeno ĉe komuna konato. Laŭ propraj eldiroj, Toren vidis la 5an de septembro 1942, kiel Lidia en la selektejo apartenis al la malfeliĉuloj, kiuj estis pelitaj al la vagonoj por transporti ilin al la detruejo en Treblinko. La tiam dekvar-jara virino memoris, ke Lidia, “marŝis reĝmaniere, rektastature, kun fiero, malsame al la plimulto de la aliaj viktimoj, kiuj estis kompreneble panikitaj”. Bone, ke ĉi tiu aktualigo povis esti aldonita en la esperanta versio de la libro de Wendy Heller.

La libro pri Lidia estas do nekutime bone verkita esperantaĵo, konceptita laŭ la usona modelo, kies avantaĝo estas ĝia vigla, malseka rakontstilo kun multaj epizodoj kaj konkretaj ekzemploj.

Parte la teksto legiĝas flue preskaŭ kiel ekscita romano (sed ĝi ne estas romano!). Iuj eroj estas eble iom tro detalaj kiel ekzemple citaĵoj el paroladoj de Lidia, kio faras la verkon iom longspira kaj dika. La decido prezenti la tutan tekston en 30 relative mallongaj ĉapitroj tamen savis ĝin. Iom kuriozaj estas eble la titoloj de la unuopaj ĉapitroj, sed tio ne gravas.

Al la literatura sukceso kontribuas kompreneble la traduka talento de Bernhard Westerhoff, dank’ al kiu la teksto fariĝis bone komprenebla, kvazaŭ kiel se oni legus ĝin en sia propra nacilingvo. Mi renkontis nur unu eraron, tute banalan, sur paĝo 272: “Al Della estis dirita, ke” anstataŭ dirite. Pri la esperantigo de iuj geografiaj nomoj eblas nature ree disputi (Verduno, Ilinojso, k.s.).

Entute temas pri elstara kaj serioza esploralaboro plenumata de Heller, kiu plene liberas de legendoj, fantazioj kaj

hagiografiaĵoj, karakterizaj parte por la malnovaj biografioj pri L.L. Zamenhof.

La esencan bibliografion pri la temo Heller konsultis, same multajn gazetajn fontojn kaj leterarkivaĵojn. En la verko tamen oni (t. e. historiistoj) sentas la mankon respektive bezonon de minimuma fontindikaro. Ankaŭ la elektitaj fotoj estas tre vidindaj, kvankam estas bedaŭrinde, ke ili ne povis esti presitaj en pli bona kvalito. Ankaŭ kiel eldonaĵo mem la libro estas minora.

Tiel do estiĝis signifa teksto ne nur por prezenti la vivon de Lidia Zamenhof, sed ankaŭ por kompletigi malpli konatajn sciojn pri la historio de la Esperanto-movado, kiu post la morto de L.L. Zamenhof misie estis daŭrigata de lia vojaĝema filino. Ĉar la libro de Wendy Heller estas sendube ankaŭ signifa kontribuo al la priholokaŭsta literaturo, indus pripensi ĉu traduki ĝin ankaŭ al la germana lingvo. Ĉu Bernhard Westerhoff denove pretus transpreni tiun taskon?


Koncerne la mondkoncepton de Lidia, mia persona impresio estas (eble erara), ke Lidia ne estis tiom vere konvinkita religia kredantino (kiel asertis Martha Root) — ŝajnas ke sole ŝi kredis je la volo de Dio, kiu laŭdire decidis la sorton de la homoj; multe pli ŝi vidis en la bahaismo taŭgan rimedon por plu

porti la torĉon de la projektoj de sia adorata patro, precipe de la idealoj de la homaranismo, kiun li inventis. Nu, la plej lastaj vortoj, konservitaj de Lidia tekstas, ke ŝi kredis je Dio, ke ŝi estas bahaano kaj mortos kiel bahaano, ĉio estus en Liaj manoj (p. 356). Ĉu estas eraro, ke Lidia aliĝis al la bahaa movado, estas malfacile diri kaj alia demando. Ĉe nebahaanoj tiu decido en ŝia vivo povas kaŭzi ian konfuziĝon kaj distancigemon vidalvide de ŝi, malgraŭ ĉia simpatio por tiu idealisma zamenhova filino. Definitiva eraro estis ŝia reveno al Eŭropo, kie ŝi finiĝis kiel judino en la neniigejo de Treblinko. Se ŝi estus serioze preparinta sian volon, ŝi estus povinta peti la statuson de rifuĝinto, despli ke sub Franklin D. Roosevelt ekzistis tia leĝo kaj dudek mil homoj, supozeble judoj plejparte, profitis la eblon resti en Ameriko. Sed Lidia volis rehejmiĝi, unue ĉar ŝi timis, ke ŝi povus perdi la polan ŝtatanecan, due ŝi celis rigardi kiel fartas ŝiaj familianoj. Ĉiuj postaj provoj forigi ŝin el Pollando al sekura loko estis vanaj, nelaste ĉar Lidia mem ne volis forlasi siajn proksimumojn.

La dubon, ĉu Lidia estis bela virino aŭ ne, oni povas definitive meti ad acta per la prezento de la du fotoj kun ŝia porteto sur paĝoj 88 kaj 369.

Andreas Künzli

## “Historio de Esperanto” aperis en la serba



La 13an de decembro serbiaj esperantistoj komune festis ĉi-jaran Tagon de Zamenhof — la Tagon de la Libro — en la urba teatro de Kragujevac, iama ĉefurbo de Serbio. En Kragujevac antaŭ unu jarcento aperis la unua lernolibro de Esperanto en la serba lingvo, kiun verkis Jovan P. Jovanoviĉ, poste urbestro de Kragujevac.

Okazis prelegoj pri Zamenhof kaj pri la historio de Esperanto-movado en Serbio kaj Kragujevac, pri instruado de Esperanto. Inter prelegoj estis kulturamuza programo, apero de aktoroj, kantistoj, legado de originalaj esperantaj verkoj k.a.

La komunan feston iniciatis kaj organizis Saša Pilipoviĉ, aktoro kaj esperantisto, en Esperantujo konata laŭ siaj kabaredoj dum universalaj kongresoj.

En la festa programo estis, interalie, prezentita la ĵus eldonita serba traduko de *Historio de Esperanto* de Aleksander Korĵenkov. La libron, originale verkitan en Esperanto, komune tradukis Pribislav Marinkoviĉ kaj aliaj membroj de la Beograda Esperanto-societo *Radmir Klajiĉ*, kiu eldonis ĝin. La libro havas 166 paĝojn.

Dimitrije Janičiĉ



# Kio nova en Miaspacejo?



## Transgenial

<http://www.myspace.com/transgenial>

*Transgenial* estas germana bando el Bielefeld. Ĝi konsistas el kvar muzikistoj: Lutz Boberg (piano), Hoppel (drumo), Conny Klee (violono, soprana saksofono), Frank Simon (kontrabaso). La instrumenta muziko fluktuas inter ĵazo, mondmuziko kaj popo kun fortaj etnaj influoj. *Transgenial* ne havas kantatajn tekstojn, kaj do instrumenta muziko ja estas universala lingvaĵo ĉu ne?

Conny, la ino de la bando, estas esperantistino, kiun oni povas kontakti en Ipernity: <http://www.ipernity.com/home/65230>

## FAMo

<http://www.myspace.com/famofamo>

De la persona kaj familia nomoj kiujn la artisto heredis, Fa kaj Mo estas la unuaj silaboj. Kunigitaj, ili iĝas FAMo. Fonetike en la franca, la vorto [fam] signifas homino, parto de la homaro tro longtempe mistraktata, tro ofte preteratentita. Fa estas muziknoto, francfonetike [mo] signifas “vorto”, taŭge por iĝi kantisto! FAMo estas do la artista nomo de Fabrice Morandeaŭ (eksa akordionisto kaj kantisto de *La Kompanoj*) por ke oni facile rememoru pri li. Sed antaŭ ĉio FAMo volas esti utila, kaj li esperas laŭeble kontribui al famigo de la Internacia lingvo, tio povus helpi por antaŭeniri.



La paĝo de FAMo nun entenas inter aliaj francaj kantoj dulingvan kanton *L'Esperant'*, kiu prezentas Esperanton. FAMo planas registri novajn Esperanto-kantojn kaj baldaŭ tie aperos tutesperanta kanto...

## Jacques Yvart

<http://www.myspace.com/jacquesyvart>

Finfine Jacques Yvart starigis sian paĝon ĉe Myspace! Tie ne aperas Esperanta klarigo, sed en la ludlisto estas Esperanto-muzika eltiraĵo el la laste eldonita albumo *Invito por vojaĝo*.

Unu el la multaj albumoj de Jacques Yvart titoliĝas *Citoyen du monde* (Mondcivitano). Ĝi estas emblemo de la engaĝiĝo de la artisto kiu ne nur postulas tiun etiketon sed ankaŭ verkis multajn kantojn kiuj temas pri tio.

Tion pruvas ankaŭ liaj kantoj en Esperanto, aperintaj en diversaj albumoj. La kanto en la ludlisto estas *La ĉevaleto* — brila adapto de kanto de Georges Brassens fare de Roel Havenman kun helpo de Pascal kaj Mari-Roza Vilain.

## Laherzio

<http://www.myspace.com/laherzio>

En Hispanio jam du madridaj bandoj aperigis Esperanto-kantojn en siaj diskoj: *Le Punk* (“La lukto estas perdita”) kaj *Tupelopone* (“Inter diro kaj faro”) Nun ankaŭ la barcelona bando *Laherzio* havas en sia ĵus aperinta albumo unu kanton en Esperanto.



*Laherzio* ludas personecan rokon kun influoj latinpunkaj kaj aliaj miksaĵoj. Ĝi konsistas el Javier Rodriguez (gitaro, mandolino kaj voĉo), Norto Mendez (drumo, perkutiloj kaj voĉo), Chuchi Delgado (saksofono kaj voĉo) kaj Fran Martinez (baso).

La drumisto Norto lernis Esperanton antaŭ dek sep jaroj. Venis al li la ideo verki Esperanto-kanton por muziko kiu sonas baltanece; li faris provojn kaj la rezulto sonis plaĉe, kaj fine la bando registris la Esperanto-kanton *Neĝa*, kiu aŭskultebblas en la miaspaca paĝo de la bando.

Norto diras, ke li estus tre feliĉa, se tiu Esperanto-kanto disvastiĝus inter la diversaj Esperanto-rondoj kiel eta kontribuo al la Esperanto-kulturo.

## Pafanto

<http://www.myspace.com/pafanto>

pafanto

Pafanto estas repisto esperantista el Chardon (Ohio, Usono). Lia muziko — generale gangstera kaj urba — estas inspirita de *La Pafklik*, *Dolchamar* kaj aliaj grupoj.

La motivo de Pafanto estas membriĝi en *Vinilkosmo* kiel repisto.

“Mi scias, — li skribis en sia miaspacejo, — ke ne estas multaj esperantaj repistoj”, kaj do Pafanto deziras krei muzikon kun *La Pafklik* kaj helpi kreadon de aliaj repistoj.

## Camping Sauvach

<http://www.myspace.com/campingsauvach>

Didier Galan, la kantisto de *Camping Sauvach* el Namur (Belgio), ekleris Esperanton en sia urba kurso, tuj post kiam li eksciis pri la ekzisto de la internacia lingvo en gazet-artikolo. Pro la tempo-manko li forlasis la kurson, sed li restis ano de la loka Esperanto-asocio, ĉar la ideo ŝajnis al li inda kaj subteninda.

Didier intencis verki kanton en Esperanto, kaj en la gazetaro oni eĉ anoncis, ke la bando kantis en Esperanto dum tio ankoraŭ ne estis vera, ĉar la lingvonivelo de Didier ne sufiĉas por verki bonan kanton. Finfine, Denis Flochon, la prezidanto de la loka Esperanto-asocio, sin proponis por traduki la ĉefkanton de la dua albumo de la bando. Didier entuziasmiĝis kaj jen la projekto realiĝis.

Temas pri *Eta feliĉo* adapto de la franca *Au petit bonheur*. Nun ĝi aŭskultebblas en la miaspacpaĝo de la bando.

Denove miaspacumis por vi

**Flo!**





## Belartaj konkursoj de UEA en 2009

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 60a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 94a Universala Kongreso en Bjalistoko.

Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj kaj kantoj, antaŭe ne publikigitaj en ajna formo. Krome validas jenaj kondiĉoj:

**Poezio:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

**Prozo:** Maksimuma longo 200×65 karaktroj. Tri premioj.

**Teatraĵo:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

**Eseo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo ("Krei pacan ponton inter la popoloj": Zamenhof hodiaŭ). Proksimuma longo 10 tajpitaj paĝoj; ĉ. 400×65 karaktroj. Premio "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.

**Filmo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo (vd. sub Eseo). Daŭro: 15–60 minutoj. Tri premioj.

**Kanto:** Originala, publikigita en 2008 (la teksto kaj melodio povas esti verkitaj de malsamaj aŭtoroj); publikigo signifas unuan publikan prezenton, aperigon en Interreto, aperigon en kompakta disko, k.s. Premio "An-Song-san" kaj du aliaj premioj.

**Infanlibro de la Jaro:** Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en 2008. Unu premio.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo kaj eseo oni sendu ilin en unu ekzemplero; por la Infanlibro kaj Kanta branĉoj en tri ekzempleroj. Principe ĉiuj konkursaĵoj, escepte de infanlibroj kaj filmoj, estas akcepteblaj rete.

Ĉiuj konkursaĵoj alvenu plej laste 31 mar 2009. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari: ✉ [michela.lipari@tiscali.it](mailto:michela.lipari@tiscali.it), ☐ Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; 📠 [michela.lipari@tiscali.it](mailto:michela.lipari@tiscali.it).

La konkursaĵoj (krom kantoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj la adreso estu en aparta retmesaĝo aŭ koverto, se oni sendas la tuton poŝte.

**Premioj:** Unua premio: 240 eŭroj; dua premio: 168 eŭroj; tria premio: 96 eŭroj; Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 168 eŭroj; Infanlibro de la Jaro: 504 eŭroj.

**Publikigo:** La rajto je la unua eldono de la premiitaj verkoj ne jam eldonitaj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

Detala regularo: [http://uea.org/dokumentoj/belartaj\\_konkursoj\\_regularo.html](http://uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regularo.html).

GK UEA

## Ricevitaj libroj

Al-Amily, Husejn. *La trezoro: Kolekto de 3.000 proverboj kaj anekdotoj el la araba kaj islama kulturo / Antaŭpar. Renato Corsetti.* — [Rotterdam]: Araba Komisiono de UEA, 2008. — 137 p., il.

Heller, Wendy. *Lidia: La vivo de Lidia Zamenhof, filino de Esperanto / Trad. el la angla Bernhard Westerhoff.* — Antverpeno: FEL, 2007. — 389 p., il.

Johano Paŭlo la Dua. *La Roma Triptiko / Trad. el la pola Lidia Ligeza.* — Krakovo: Hejme, 2006. — 32 p., il.; 1000 ekz.

Laube, Jiří. *Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo? Jes, sed nur per demokratia simbiozo de la kulturaj.* — Dobřichovice: KAVA-PECH, 2008. — 32 p.

Lins, Ulrich. *Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA.* — Rotterdam: UEA, 2008. — 126 p., il.

*Raportoj pri la Invitprojekto.* 20 invititoj el Azio al la 92a UK en Jokohamo / Antaŭpar. Hori Jasuo. — Tokio: JEI, 2008. — 72 p., il.; 500 ekz.

[Ĉiuj supre listigitaj libroj estis senditaj kiel recenzoekzempleroj.]

## Ricevitaj gazetoj

Aŭstria Fervojisto. 2008/3; Esperanto en Azio. 2008/61; Heroldo de Esperanto. 2008/13,14; Informa Bulteno. 2008/4; La Gazeto. 2008/138; La Merkato. 2008/96; La Movado. 2008/693; La Ondo de Esperanto. 2008/12; La Revuo Orienta. 2008/10; Le Monde de l'Espéranto. 2008/567; Literatura Foiro. 2008/235; Litova Stelo. 2008/5; Monato. 2008/11,12; Okazas. 2008/567; Osieka Sonorilo. 2008/1; Pola Esperantisto. 2008/5; SES Informas. 2008/4; Sennaciulo. 2008/9-10; Spiegulo. 2008/4; TEJO Tutmonde. 2008/5; Tempo. 2008/3.

## Gazetoj

Literatura Foiro, 2008, №235

Estas pli da (inter)lingvistiko ol kutime en la oktobra numero de *Literatura Foiro*, danke al interesaj kontribuoj de Márton Fejes (*Morte naskita pazigrafio*), Geraldo Mattos (*La ignorata Fundamento*), Giorgio Silfer (pri Giuseppe Peano) kaj al la decidoj de la Lingva Komitato pri kelkaj demandoj.



Virinoj okupas gravan lokon, ĉu per meditiga rakonto de Akimun Rahman (lokita en Triesto, kun azianoj kiel protagonistoj) ĉu per brila eseo de Manuel de Seabra, pri la virino en la Homeraj poemoj.

Inter la aliaj artikoloj, estas rimarkindaj la analizo de Anatolo Gonĉarov pri raŭmismo en Sovetunio kaj la teksto de Abdurahman Junusov pri kunlaboro inter amaskomunikiloj.

La sepa arto ankaŭ ĉeestas, per recenzo fare de Giorgio Silfer pri la franca filmo *Inter la muroj*, premiita ĉi-jare en Cannes.

*Literatura Foiro* estas posedata, eldonata kaj administrata de LF-koop. Ĝia ĉefredaktoro estas Ljubomir Trifonĉovski.

HeKo

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia  
revuo en Esperanto kun  
legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco  
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
[monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)

Por la novembra tasko “Komuna nomo” venis 11 respondoj; ĉiuj respondoj, krom unu, estas ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans (Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Ester Olsen (Norvegio), Dorota Burchardt, Hanna Skalska, Zbigniew Tytkowski, Zbigniew Czupkaĥo (ĉiuj el Pollando), Roland Larsson (Svedio) kaj Klara Ilutoviĉ (Ruslando).

La loto donis premion al **Klara Ilutoviĉ**. Ni gratulas ŝin!  
La ĝusta respondo: *Sinonimoj*.

## Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampon per nombroj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en la kvadratoj 3×3 la nombroj ne ripetiĝu.

La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ 10 jan 2009.

Komputile kompilis **Aleksej Korĵenkov**

	7	6			5			8
	8						5	
		2		6	1	4	3	
8				1				
			6		3			
				7				1
	9	5	4	8		3		
	2						8	
7			9			1	6	

## Judaj historietoj

### Juda aritmetiko

Gasto venis al Ĥelem (“La urbo de la malsaĝuloj”) kaj tagmanĝis en loka gastejo.

Gasto (post la deserto): “Kiom mi devas pagi?”

Gastejstrino: “Mi tuj kalkulos: pano, supo kaj patkukoj — sep kopekoj; viando, fiŝoj kaj kompoto — ankoraŭ sep kopekoj; sume: dek unu kopekoj”.

Gasto: “Ne povas esti! sep kaj sep estas dek kvar!”

Gastejstrino: “Ne, sinjoro. Mi ne eraras, ĉar sep plus sep estas dek unu. Vidu: Mi havas kvar infanojn de mia unua edzo. Mia nuna edzo havas kvar infanojn de sia unua edzino. Krome, ni ambaŭ havas tri infanojn, kiuj naskiĝis al ni post nia geedziĝo. Tio diras, ke mi havas sep infanojn kaj ankaŭ li havas sep infanojn. Sed malgraŭ tio ni havas hejme entute dek unu infanojn...”

El la kolekto de **Josef Ŝemer**

## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de *reduktoro*

### Omleto vorota de Dorota?

La *kvina telero* de la kvakova ĵurnalistino kaj verkistino Dorota Terakowska... (*La Ondo de Esperanto*, 2008, №12, p. 22; rimarkis Ionel Onet)

### Opio por verda popolo

Verkado de artikoloj estas grava afero precipe se temas pri opioartikoloj... (Giorgio Bronzetti, <http://groups.yahoo.com/group/informado/message/1169>, 30 jun 2008; rimarkis Lu Wunsch-Rolshoven)

### Tuŭumba fonfo!

<Jean Lehane> kunfonfis klubon en Toowoomba... (*Esperanto*, 2008, №10, p. 214)

### En vino la venko?

...se J<unularo> E<esperantista> B<rita> volus finvenkisman prezidanton, ĝi elektus vinvenkisman prezidanton... (Marteno Minich, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/12037>, 1 nov 2008)

### Itisma naturismo

... usonoj estus nature plej bonaj tradukitoj ol esperantitoj... (anonima komento al *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*, <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8034>, 6 aŭg 2008)

### Disnaĝu likvaj fakuloj!

Inter la klopodoj por solvi la problemon, estas la pli bona distribuado de la malmultaj fluantaj profesiuloj... (Emilio Cid, <http://groups.yahoo.com/group/reago/message/7736>, 15 jun 2008)

### La unuaj maldungotoj

Kion fari kun la personoj dungitaj por dubi filmojn? (Raymond Gùrard, [http://groups.google.com/group/europo2/browse\\_thread/thread/8e6bda5e505f0f51/1a934e5b-93f677df?hl=eo&m](http://groups.google.com/group/europo2/browse_thread/thread/8e6bda5e505f0f51/1a934e5b-93f677df?hl=eo&m), 29 apr 2008)

### Gbeglo la homama

Ĉu fakte c-ano Gbeglo estas prave akuzebla pro homofobio? (<http://www.esperantio.net/index.php?id=687>)

Plukis **István Ertl**

La foton (de Luis Serrano Pérez) de la memortabulo, starigita en oktobro en Salou (Katalunio) ni volis aperigi kiel foton de la plej nova ZEO. Sed en novembro en la sama lando aperis restaracio *Esperanto* (vd. en la apuda paĝo), eĉ pli nova ZEO. Gratulojn!



## Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

**Argentino:** Roberto Sartor, Beruti 2792, 3° 9, C 1425, BBF, Buenos Aires

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

**Brazilo:** BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

**Britio:** EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

**Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

**Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

**Hungario:** HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest  
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

**Italio:** IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano  
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

**Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-tu, 162-0042

**Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

**Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)

**Latvio:** Margarita Želve, Râpniecšbas 35-13, LV-1045 Ršga

**Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

**Nov-Zelando:** G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

**Pollando:** PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

**Portugallio:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

**Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

**Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

**Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

**Svedio:** Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

**Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



**Italio.** En la novembra Ondo aperis artikolo pri la partopreno de esperantistoj en la 42a Lucca Comics and Games — la plej grava kaj fama foiro pri komikoj en Eŭropo. Kaj nun ni, kun deca malfruo, aperigas foton de la esperantista teamo ĉe la Esperanto-stando. (Oliviero Bagnoli)



**Ruslando.** La perlo de la lingva festivalo, okazinta la lastan novembran semajnfino en la volga urbo Uljanovsk (vd. p. 10), estis mondvojaĝanto Vladimir Savinov. Li multe rakontis pri siaj vojaĝoj kaj dum du tagoj regalis la partoprenantojn per diversaj ĉinaj teoj (Jurij Karcev).



**Katalunio.** En L’Hospitalet de Llobregat, apud Barcelono, malfermiĝis restoracio Esperanto (strato Tarragona 23). Lu du junaj kunadministrantoj diris, ke ili elektis la internacian titolon, ĉar ili servas internaciajn kuirajojn. Mi manĝis tie — la manĝaĵo estas bongusta kaj bone prezentita. (Martí Guerrero)



JORGE LUIS BORGES  
**La sekreta miraklo**

Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*  
Serio Mondliteraturo, Volumo 16  
200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne


**Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj**

Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*  
Serio Mondliteraturo, Volumo 15  
208 paĝoj, 20 eŭroj



J.R.R. Tolkien  
**LA HOBITO**  
aŭ  
tien kaj reen

J.R.R. Tolkien. *La hobito, aŭ tien kaj reen*  
Serio Mondliteraturo, Volumo 9  
224 paĝoj, 18 eŭroj



Georges Simenon

Trovas en Concarneau

**La flava hundo**

Georges Simenon. *La flava hundo*.  
Serio Mondliteraturo, Volumo 14  
120 paĝoj, 12 eŭroj.